



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Januaro 2019 n-ro: 37



## Merhaba,

Ocak 2019 sayımız ile üç yılı devirip yeni bir yıla başlıyoruz. Kuzey yarım kürede kış artık iyice yerleşti, evinizde sıcak bir köşede okumanız için size gene birbirinden güzel yazılar hazırladık. Mesela :

- \* Arkadaşımız Konuralp Sunal kuvvetli kalemi ile yepyemi bir sinema serüveni başlattı: "Mühürlenmiş zaman".
- \* Arnavutluk'tan iki güzel hikaye.
- \* Romanya ve İtalya'dan iki mizah yazısı
- \* Litvanya'dan başka bir hikaye
- \* Yunanistan'dan bir mitoloji hikayesi
- \* Ukrayna'dan, Fransa'dan, Avustralya'dan hikayeler ve romanlar
- \* Dili öğrenmekte olan arkadaşlarımız için de yeni bir köşeye daha başlıyoruz : "Esperanto Öğrenelim!". Bu sayıda Vietnam'dan bir hikaye ile kısa sözlüğü.
- \* ve daha başka bir çok şey...

**Hepinize iyi okumalar !**

## Saluton,


Kun nia januara 2019 numero ni finas tri jarojn kaj eniras en novan jaron. En la norda hemisfero vintro enradikiĝas. Ni preparis por vi belajn legaĵojn por ke vi legu ilin en iu varma angulo en via domo.

Ekzemple:

- \* Nia amiko Konuralp Sunal kun sia forta krajono komencas novan rubrikon pri kino: "Tempo Sigelita"
- \* El Albanio du belaj rakontoj
- \* El Rumanio kaj Italio du humuraĵoj
- \* El Litovio alia rakonto
- \* El Grekio rakonto el mitologio
- \* El Ukrainio, Francio ka Aŭstralio rakontetoj kaj noveloj
- \* Nova rubriko por niaj gemikoj kiuj lernas la lingvon "Ni lernu Esperanton!". En ĉi tiu numero estas rakonteto el Vjetnamio kun mallonga vortareto.
- \* kaj multaj aliaj...

**Bonan legadon al ĉiuj !**

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

|  |    |
|--|----|
| Malfermo   | 1  |
| Enhavtabelo                                      | 2  |
| Kursoj   | 2  |
| Festo de Zamenhof Tago                           | 2  |
| Esperanto Sumoo                                  | 3  |
| UEA  | 3  |
| TEJO   | 3  |
| Leteroj de niaj legantoj                         | 4  |
| Letero de prezidanto de UEA al la landaj asocioj | 4  |
| Tempo Sigelita                                   | 5  |
| Poemoj por katamantoj                            | 6  |
| Esperantistoj renkontiĝas en la Paraiba Valo     | 6  |
| Monumento de Carlo Bourlet -- recenzo            | 7  |
| Sukcesa 12-a Kongreso de Esperanto en San-Paŭlo  | 7  |
| Ismail Kadare kaj Boris Pasternak                | 8  |
| Malsupren sur deklivo -- humuraĵo                | 10 |
| Hajkoj pri Vasil Petrov                          | 11 |
| La Aŭtunaj Muŝoj (parto 8)                       | 11 |
| Pri Amikeco                                      | 13 |
| NARCISO kaj ΕΨΟΑ (ΝΑΡΚΙΣΣΟΣ και ΗΧΩ)             | 14 |
| Papavoj kaj Pikiloj                              | 16 |
| La konatuloj de strato                           | 18 |
| El la libro de "Dao de Jing" (29)                | 19 |
| Ŝercoj   | 19 |
| Kurcvortenigmo                                   | 20 |
| Senĝardenaj apartamentaroj                       | 20 |
| Mallonga Historio de Filozofio (34)              | 21 |
| La filoj de la vilaĝano                          | 22 |
| Floro (3)  | 24 |
| Ĉu Esperanto havas kulturon? Jes kaj ne!         | 26 |
| Kosmoliftoj, ĉu sciencfikcio?                    | 29 |
| Bona Lernantino - Ni Lernu Esperanton!           | 31 |
| Facilaj rakontoj                                 | 32 |

\* La tri Epopeoj de Esperantujo

\* Artefaritaj Lingvoj

Ni ankaŭ sukcesis aperigi artikolon pri Esperanto en papera loka gazeto. Jen ligilo al la reta blogaĵo de tiu artikolo en la blogretejo de la gazeto:

<http://www.gazetekadikoy.com.tr/yasam/irksiz-cinsiyetsiz-bir-dil-esperanto-h13397.html>


## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

## Kursoj



Nuntempe okazas nur unu kurso en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul kun 9 lernantoj kaj kies gvidanto estas Murat Özdizdar.

<https://edukado.net/kursejo?kid=26934>

## Festo de Zamenhof Tago / Esperanto Libro Tago en Turkujo

En la 15-a de decembro sabate en Turkujo (en Kadikoy distrikto de Istanbul) ni festis la Zamenhof Tagon / Esperanto Libro Tagon pere de tuttaga kunveno. En la kunveno partoprenis 25 homoj kaj almenaŭ duono de ili estis homoj kiuj jam aŭdis pri Esperanto. Antaŭtagmeze oni prezentis en turka lingvo la historion de Esperanto kaj oni faris enkondukon al la lingvo surbaze de la 16 reguloj kiuj troviĝas en la Unua Libro. Oni ankaŭ spektis la video-gratulmesaĝojn kiuj venis el diversaj landoj por nia festo. Posttagmeze oni faris mallongajn prezentojn ĝenerale en Esperanto lingvo:

\* Kion ni faras POR Esperanto

\* Kion mi faris PER Esperanto

\* Mezoriantaj Kunvenoj en Turkujo

\* Kiel mi fariĝis esperantisto

\* Kiel mi lernis Esperanton



*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



La 55-a Internacia Esperanto-Sumoo okazis inter 11-a kaj la 25-a de novembro 2018. En ĝi partoprenis 311

legantoj el 33 landoj. Tiu nombro ne estis la plej alta ĝis nun. La unuaj kvin landoj estis:

1. Japanio: 72
2. Koreio: 40
3. Brazilo: 33
4. Francio: 33
5. Pollando: 20

Bedaŭrinde el Turkujo partoprenis nur 1 leganto.

272 legantoj el 311 (74,6%) venkis perfekte. Kvanto de legitaj paĝojestis pli ol 18 000 paĝoj. Averaĝe unu homo legas 60 paĝojn dum 15 tagoj de la Sumoo.

La Januara 2019 Sumoo komenciĝos la 13-an de januaro dum 15 tagoj.

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>  
Sumoo en Vikipedio:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Esperanto-Sumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)  
Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>



## UEA



N-ro 768 (2018-12-04)  
**Prepare al Homrajta Tago, 10 decembro, kaj Zamenhof-Tago, 15 decembro**

La 10-a de decembro estas Homrajta Tago ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Tiu ĉi Tago de la Homaj Rajtoj markas. [...]

N-ro 769 (2018-12-04)

**Konkurso por krei novan kunlaborejon por nia komunumo**

KION? La Estraro de UEA, en la klopodo igi la Asocion pli demokratia, kreas novan forumon por faciligi la komunikadon [...]

N-ro 770 (2018-12-10)

**Deklaro de UEA okaze de la Tago de Homaj Rajtoj 2018 kaj la Sepdeka Datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj**

Okaze de la Tago de Homaj Rajtoj, la 10-a de decembro 2018, kaj festado de la 70-a datreveno de la [...]

N-ro 771 (2018-12-14)

**UEA alvokas al subteno "Partoprenu UK-on": Lahtio, 2019**

Pere de Fondaĵo "Partoprenu UK-on" UEA havas la eblon subteni la aliĝkotizon de kelkaj kongresanoj dum la Universala Kongreso en Lahtio, [...]

N-ro 772 (2018-12-17)

**En 2019 la Belartaj Konkursoj de UEA alvenas al sia 70-a eldono**

Jam aperis en Revuo Esperanto n-ro 11/2018 (novembro) kaj en la retejo <https://revuoesperanto.org/belartaj-konkursoj> la alvoko al la Belartaj Konkursoj de UEA, kiuj [...]

## TEJO



**Clément Baleyte, la nova volontulo de TEJO**

Ni ĝojas prezenti al vi la novan volontulon de TEJO Clément Baleyte! El kiu lando vi estas? Mi estas el Francio, precize el Bordojo. Kion vi faras en via eksterEsperantujo vivo, rilate al studoj kaj laboro? Mi studis kaj diplomiĝis... [...]

**Esperanto estas mojosa! – Zamenhofa Tago 2018**

Feliĉan Zamenhofan Tagon 2018! Homoj el la tuta mondo sendis videojn al ni por rakonti kial Esperanto estas mojosa. Kunhavigu la filmeton kun viaj amikoj kaj parolu al ili pri Esperanto! Ni vere fieras pri la vigleco kaj diverseco de nia... [...]

**TEJO partoprenis seminarion en Moskvo pri junulara politiko kaj laboro**

Inter la 25-a kaj la 28-a de novembro okazis en Moskvo internacia faka seminario "La aliro de junuloj al rajtoj: lerni kaj kundividi spertojn pri junulara politiko kaj junulara laboro". La eventon kunorganizis la Junulara Departemento de la Konsilio... [...]

**Manuela Burghelea, la nova volontulino de TEJO**

Ekkonu la novan volontulinon de TEJO Manuela Burghelea! El kiu lando vi estas? Mi devenas de Rumanio, sed mi taksas min mondĉivitanino. Kial vi decidis volontuli en la Centra Oficejo en Nederlando? Esperanto estas mia ĉefa ŝatokupo ekde kiam mi eklernis... [...]



## Leteroj de niaj legantoj



Estimata,

Hodiaŭ mi ricevis la novan numeron de la Turka Stelo. Tute ne "modesta revueto" sed impona kolekto! Ĝi klare montras la valoron de Esperanto, ĉar homoj el multaj mondopartoj prezentas siajn tekstojn. Kaj kia alta kulturnivelo! Gratulegon kaj dankegon!

**Paŭlo Sergio Viana**, el Brazilo



Koran dankon pro la alsendaĵo, kara amiko Vasil!  
Gratulon al ĉiuj por la belega decembra revuo Turka Stelo!

Amike,

**Maria Nazaré Laroca**, el Brazilo



Karaj,  
la plej bela gazeto en Esperantujo redaktita de unu el niaj prizorgantoj eldoniĝis.

**HORI Jasuo**, el Japanio  
Komitatestro de Esperanto-Sumoo



Dankon pro la bela Turka Stelo.  
Mi tre aprezis malkovri Ali Lidar esperantigita de Fatma Eroglan!  
Kore via,

**Roland Platteau**, el Francio

## Letero de prezidanto de UEA al la landaj asocioj

Karaj amikoj:

Mi skribas por peti vian helpon en la membrokampanjo de UEA por la jaro 2019. Niaj aliĝintaj landaj asocioj estas la plej gravaj fontoj de novaj individuaj membroj de nia Asocio. Ju pli da tiaj membroj ni havas, des pli bone UEA povas reprezenti la tutmondan esperantistaron.

Kaj ne temas pri ordinara jaro. En Lisbono la Komitato reformis nian membrisistemon, tiel ke ekde la venonta jaro la kategorioj "Membro kun Gvidlibro" kaj "Membro kun Jarlibro" anstataŭiĝas per la nova kategorio "Baza Membro". Ni bezonas vian helpon por klarigi tiun ŝanĝon al viaj membroj.

Fariĝi "baza membro" de UEA estas maniero montri sian solidarecon kun la mondvasta komunumo de esperantistoj. La kotizoj por baza membreco estas ligitaj al la relativa riĉecnivelo de la diversaj landoj, ekde nur 2 eŭroj en la plej malriĉaj landoj ĝis 44 eŭroj en la plej riĉaj. Ĉiu esperantisto, kiu aliĝas laŭ la plej alta tarifo, samtempe subtenas la membriĝon de homoj kun multege malpli da rimedoj. Tiu sistemo celas esti pli justa kaj inkluziva.

Pli novaĵo estas la rabatoj por junuloj. Ĝis la aĝo de 19 jaroj, homoj povas aliĝi je nur kvarono de la kutima kotizo (t.e. 11 eŭroj en la plej riĉaj landoj). Inter la aĝoj 20 kaj 25, la kotizo estas duono de la kutima. Ni tre esperas, ke vi helpos nin diskonigi tiujn rabatojn inter la junaj esperantistoj en via lando.

Bazaj membroj ricevas ĉiujn servojn kaj rajtojn de membreco, inkluzive de rabato por la Universala Kongreso. La informoj en Jarlibro estos alireblaj elektronike per la nova reta membrospaco de UEA, al kiu iom post iom aldoniĝos novaj funkcioj. Papera eldono de la Jarlibro estos daŭre mendebla, kontraŭ

aldona pago.

La kategorio Membro-Abonanto restas pli-malpli senŝanĝa. La kotizo estas tiu de Baza Membro plus 30 eŭroj por ricevi la paperan eldonon de la revuo Esperanto. La reta eldono estos legebla por ĉiuj membroj.

Ankoraŭ eblas fariĝi Dumviva Membro de UEA. Ekde la nova jaro la kotizo por tio egalas al 30-oblo de la koncerna jarkotizo (de Baza Membro aŭ de Membro-Abonanto). Ĝis la fino de 2018, oni ankoraŭ povas fariĝi Dumviva Membro je la malnovaj tarifoj (25-oblo).

La kialoj fariĝi individua membro de UEA restas la samaj. Ne temas nur pri la konkretaj servoj, kiujn oni ricevas kiel membro. Temas pri tio, ke UEA estas la sola Esperanto-asocio malfermita al esperantistoj en ĉiuj landoj, ĉiuj tendencoj, ĉiuj vivsitacioj. Nia Asocio estas konkretigo de la vizio de D-ro Zamenhof, pri mondo en kiu homoj renkontiĝas, amikiĝas, kunvivas kaj kunlaboras kun homoj. Eĉ en la plej riĉaj landoj, la kosto de baza membreco estas malpli ol unu eŭro semajne. Tio estas malgranda investo en granda idealo.

Niaj landaj asocioj estas kolonoj de nia Asocio, videblaj pruvoj de nia tutmondeco. Bonvolu helpi nin montri tion ankaŭ per la kreskigo de nia individua membraro! Eĉ 10%-a kresko en via lando estos bela indiko pri la solidareco de viaj samlandanoj kun aliaj samideanoj tra la tergloblo.

Elkore, bondezire,

**Mark Fettes**  
Prezidanto de UEA

## ĈIUJ MATENOJ DE L'MONDO

**M**i ofte pridemandas la utilecon kaj realecon de arto. Signifoj kiel universaleco, senmorteco kaj konstanteco ŝajnas al mi iom troigaj. Fakte la signifo de universaleco – mi pensas, ke ĝi devenas el la franca vorto universalité – min metas en pripensadon. Se la kosmon formas galaksioj, steloj, planedoj kaj antaŭ nia propra Galaksio, mi tute ne havas kredon, ke la arto kreita de homoj resonadas ĉie ĉi. Plue, ĉu la kosmo estas ununura kosmo? Mi ne certas se la homa arto eĥas en la kosmo sed mi certas, ke kelkaj artaĵoj ja skuas min kaj multajn aliajn homojn profunde. Jen en ĉi tiuj maloftaj momentoj mi konvinkiĝas pri la « realeco » de arto. Ĝuste tiel kiel pri la eksterordinara filmo « Tous Les Matins du Monde » (Ĉiuj matenoj de l' Mondo » kreita de verkisto Pascal Quignard kaj direktoro Alain Corneau. Kvankam pasis 27 jaroj post ĝia eldono en 1991, pasintsemajne mi spektis ĝin du foje kaj mi sentis la saman guston, kiun mi sentis multaj jaroj antaŭe dum mia unua spektado de la filmo. La kialo, ke mi denove spektis tiun filmon estas, ke mi kiel aktoro kaj rakontisto, volis transformi kaj adapti tiun simplan sed skuantan rakonton por unuaktora teatraĵo. Kaj ankaŭ antaŭhieraŭ mi legis intervjuon farita kun la nun forpasinta Alain Corneau kiam li venis al Istanbul. Kiam li formis la scenaron de la filmo kune kun Pascal Quignard ili pensis, ke « tiun filmon eble spektos nur la francaj piano instruistoj. » Sed arto – tio estas filmo – eliras el la manoj de sia kreinto kaj fariĝas propraĵo de ĝiaj spektantoj. Malgraŭ ilia opinio la filmo estis tre ŝatata, kaj la KD'oj de la majstro de « viola a gamba » Jordi Savall vendiĝis rekorde. Rakonto kiu pridemandas pri tiom simpla kaj malgaja artiston eniras la korojn de la spektantoj kaj entroniĝas tie, ĉu en Turkujo ĉu en iu alia parto de la mondo. Ĝi estas rakonto, kiun oni povas travivi ie ajn en la mondo, kvankam la filmo estas en la franca lingvo kaj la rakonto okazas en Francujo. La rakonto komparas la « profitema-kreema » komprenon kun la « idealista-pefektista » pere de du veraj muzikistoj el la baroka epoko ; la palaco muzikisto Marin Marais kaj lia majstro – instruisto kaj virtuozo de « viola da gamba » M.de Saint-Colombe. Oni scias malmulton pri Saint-Colombe. Estas tre malmultaj historiaj informoj enmane pri li. Quignard, produktema verkisto kaj muzikisto, kiu devenas ankaŭ el muzikista kaj literaturista familio, eble kreis la karakteron de Saint-Colombe, kiun eble neniam vivis. Neniu problemo ! Sur la blanka sceno, ĝia nekompromisa, grumblema


kaj obstina karaktero - mi pensas ke ĝi iomete rememorigas min la karakteron de Cyrano de Bergerac - perfekte kontraŭas la karakteron de Marin Marais kiu volas atingi sukceson facilmaniere, kiu havas komplekson pri socia klaso, kaj kiu havas grandan ambicion. Plue en ambaŭ la romano kaj la filmo, la klaskonflikto de Marin Marais – la filo de ŝufaristo – kun M.de Saint-Colombe, kiu havas sufiĉan riĉecon por vivteni sin, estas rakontita kun granda sukceso. Do, kio estas la komuna intereso de tiuj du viroj ? Pasio al muziko. Kaj tio estas rakontita tre kortuŝe ĉefe en la fino de la filmo. La filmo estas la rezulto de bona teamo. Sed se ni parolus pri la aktoroj ; estas tri gigantaj aktoroj : Jean-Pierre Marielle en la rolo M. de Saint Colombe, Gerard Depardieu en la rolo de Marin Marais kaj Anne Brochet en la rolo de Madeleine... Tamen ankaŭ la aliaj aktoroj estas tre bonaj. Oni ne devas malatendi la veteranojn de la franca kino Michel Bouquet kaj Jean-Claude Dreyfuss. Mi notis ankaŭ la jenon en la filmo : Marin Marais estas senama viro, Colombe teniĝas je la memoro de sia edzino tamen li ne povas esprimi sian amon. La plej aĝa filino de Colombe, Madeleine : iu perdita virino. La muziko, kvadratoj kun la gusto de arto de Rembrandt, dialogoj kiuj servas favore de kinoarto, kaj ĉie odoras la bona kunlaboro de literaturo-kinematografio.



## MI AMAS VIN SEPA ARTO !

## MI AMAS VIN "LATERNA MAGICA" !

verkis kaj sendis Konuralp Sunal el Turkujo  
(tradukis Vasil Kadifeli el Turkujo)



## LA KATIDA ESPLORISTO

Mia katido estas esploristo  
fortika, multtalenta, tre kuraĝa.  
Ĉu vi ne kredas tion? Jen la listo.  
Vidu; li vere estas multvojaĝa.

Li venkis la terurajn Sofo-Montojn,  
transkuris la Dezerton de la Planko;  
sen helpo trovis la Lavkuvajn Fontojn  
kaj la Kavernon de l'Sekiga Ŝranko,

kie l'aero estas varma, kie  
brunaj nilonaj stalaktitoj pendas;  
li marŝas kie, longe kaj glacie,  
la Mar' Linoleuma sin etendas

en koridoro; en la Oceanon  
Bankuvan li eĉ falis; sed sin savis;  
li amikiĝis la sovaĝan klanon  
de l'Dukuruloj; per dancado ravis.

Li luktis iam kontraŭ dratserpento,  
kaj iam kontraŭ anakondo ŝnura;  
drakojn mortigis li per propra dento;  
ĉe l'insektaro restas li terura.

Kelkfoje li ekdormas sur la krusto  
de vulkaneg' dormanta, kaj ne timas -  
jes, dormas li sur mia propra brusto;  
kaj mi esperas, ke vi lin estimas.

## LA KATO FORESTAS

Kaĉjo en kat-hotelo gastas  
(miaŭa korb' sur trajn' foriris);  
silento sekvas kaj kontrastas,  
paco, al kiu ni sopiris.

Li ne disgratos niajn meblojn  
hodiaŭ, nek sur bret' hodiaŭ  
montros al ni diversajn eblojn  
pri porcelan-fracaso. (Miaŭ!)

Mi povas verki sen la ĝeno  
de lia plumĉasado; triki  
sen eta pelta suvereno,  
kiu komencas sin impliki.

Paco! Trankvilo! Ho, mi dankas!  
Sed baldaŭ mi, ĉe tia mutio,  
eksentos ĝenon. Io mankas.  
Mankas katida miskonduto.

## LA KATIDO DORMAS

Sen scivolemo kaj sen apetito,  
sur la kanap' li rondas.  
Nur la fluida flank' silente ondas;  
sen li la brua, skua mondo mondas.  
Li kaŝas la vizaĝon, cirklon senpasian;  
li estas io strange absoluta;  
li estas surda, blinda, milde muta,  
fermita cirkvito.



## Esperantistoj renkontiĝas en la Paraiba Valo

**J**e la 18-a de novembro 2018 okazis unu plia entuziasma Renkonto de Esperantistoj en la Paraiba Valo - regiono inter Rio-de-Ĵaneiro kaj San-Paŭlo, kie situas la viglaj Esperantogrupoj. Ĉi-foje, en la urbo Paraiba do Sul, en ĉambroj de municipa lernejo, sub gvido de Luiz Alberto Coelho, loka veterano. Partoprenis trideko da samideanoj el naŭ urboj. La eventon aŭspiciis Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro.

En la programo, oni prezentis prelegojn pri "La Origino de Demokratio" (P.S.Viana), pri "La Kvin Fazoj de la Esperanta Literaturo" (F. Pita), pri "Guto da Gramatiko" (P.S.Viana), pri "Investado je Krudaj Varoj" (J. Linck).

Okazis ankaŭ diskutoj pri SAT kaj pri la Esperanta komunumo. Oni prezentis enkondukon de la lingvo al novuloj, pere de lingvaj ludoj (Vitor Mendes). Krome,

oni varieteis per pluraj kantoj en Esperanto, fare de Miguel Klav, Dirce Sales (kiu lanĉis novan kanzonon originale

verkitan en nia lingvo) kaj Tânia Paixão (kiu krome proponis etan pantomimon vestite kiel Chaplin). La tuta etoso estis tre entuziasma.

Dum la evento funkciis eta libro servo kaj budeto de Esperantaĵoj.

(Informas **Luiz A. Coelho** kaj **P.S.Viana**)





## Monumento de Carlo Bourlet -- recenzo

**T**iu libro, organizita de la fama brazila esperantisto Ismael Gomes Braga, estis eldonita de Brazila Spiritisma Federacio en 1987 (dua eldono). La eminenta aŭtoro estis la franca matematikisto kaj sciencisto Carlo Bourlet, kiu fondis la gazeton "La Revuo" en 1906.

Monumento de Carlo Bourlet estas bona kaj instruanta legindaĵo. Ĉiu ĉapitro povas esti legata aparte, kaj tiel la verko estas kolekto de sendependaj artikoloj, kiu tre utilas por studo ĉefe pri stilo. En Brazilo oni ofte uzas tiun libron kiel modelon por superaj Esperanto-kursoj.

Ismael elprenis artikolojn de Bourlet publikigitajn en "La revuo", kiuj aperis en la rubriko "Babilado", sub la titoloj sekvantaj: La evoluado de Esperanto, La granda inkvizitoro, Natura evoluado de Esperanto, Internacia Kongreso de la perioda gazetaro, Ni legu la esperantan literaturon, La morto senkompate vundas la esperantistaron, La Kvina Internacia Kongreso de



## verkis kaj sendis Euripedes Alves Barbosa el Brazilo

la Matematikoj, plendoj kaj konsiloj al la Akademio, Pri la vortfarado en Esperanto kaj Ni agu ekster nia rondo.

Tiujn artikolojn Ismael organizis libroforme kaj nomi la verkon "Monumento de Carlo Bourlet". Ismael mem skribis la antaŭparolo kaj metis en la libron ankaŭ jenajn tekstojn: "Carlos Bourlet mortis", de Gabriel Chavet; "Carlo Bourlet", funebra parolado de Julius Gluck; "Rememoroj al Therese Bourlet, verkita de Fernando Duviart; "Parolado de D-ro Zamenhof super la tombo de Carlo Bourlet".



Carlo Bourlet estis klera kaj kompetenta esperantisto kaj havis riĉan stilon, tial li donis al la esperantistaro altkvalitajn artikolojn, kiujn li aperigis en la gazeto "La revuo".

Ĉiu esperantisto fieros posedi ĉi tiun belan kaj legindan verkon.

verkis kaj sendis **Euripedes Alves Barbosa**  
el Brazilo

## Sukcesa 12-a Kongreso de Esperanto en San-Paŭlo

**D**e la 12-a ĝis la 14-a de oktobro 2018 okazis en la urbo Ataibaia, en ŝtato San-Paŭlo, la 12-a Ŝtata Kongreso de Esperanto. Enskribiĝis 85 homoj (inter ili du gekubanoj), kiuj dum tri tagoj kunsidis en komforta Centro de Eventoj, meze de belega, arboriĉa Parko de Akvoj.

La programo estis tre varia je prelegoj (30-minutaj) kaj prelegetoj (15-minutaj). Oni parolis pri Esperanto kaj Duolingo, Muziko en Matematiko, Universala Kongreso en Lisbono, Dimensioj en la Universo, Anarkiismo kaj Esperanto, Historio de Brazilo, Genealogio, Poezio, Veganismo, ILEI, Aktivado por EASP, Pseŭdoreligioj.

Krome, okazis rapida kurso de Esperanto, paroligaj kunsidoj por komencantoj, arta vespero kaj Intervjuo kun veteranoj ("Viva Gazeto"). Dum la tuta kongreso funkciis sufiĉe ampleksa libroservo. En la kongreso oni lanĉis kvar novajn librojn, iniciate de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo kaj de la nova brazila eldonejo Esprima.

Unu el la plej kuriozaj detaloj en la kongreso estis la komuna foto. Kongresanoj staris sur placo kaj formis grandan kvinpintan stelon, kiun de la ĉielo fotis

kaj filmis flugroboto.

Entute plene sukcesa kongreso!

Informis **Paulo Sérgio Viana** el Brazilo



**L**astatempe, aperis nova romano de Ismail Kadare <sup>1</sup>, "Kiam regantoj kverelas". La aŭtoro konfesas ke li motiviĝis de telefon-konversacio inter Josif Stalin kaj Boris Pasternak <sup>2</sup>, siatempe. Laŭ aŭtoro, ankaŭ Pasternak- verkisto, estis iaspeca reganto.. La eldonisto priskribas momenton kiam naskiĝis tiu ideo de nia elstara verkisto.



*Kadjare kaj Hudri*

## La incimotivo de nova libro de Kadare

-- de **Bujar Hudhri** <sup>3</sup>

*"Ĉe la pordo de instituta internulejo, mi vidis Jevtuŝenkon* <sup>4</sup>.

*- Ĉu vi vidis Belan?- li demandis min."*

Ĉi tiun dialogon el la romano "La Krepusko" de Kadare, mi rememoris kiam, ĉe la ĉefelirejo de aeroporto Ŝeremetjevo, en Moskvo, ekaperis la elstara rusa poeto, Evgenij Jevtuŝenko. Li ĵus descendis el aviadilo, kun dorsoteko, tirante valizon kaj serĉante, certe, taksion. Mi ekpensis demandi lin:

*"Ĉu vi vidis Kadare-n? Ĉu vi kunflugis?"*

Mi bezonis iom da tempo por rekonsciĝi kaj formuli ruslingve la demandojn, kiam fronte de mi venis Kadare mem kaj mi vidis kameraiston hastante por fiksi la ties alvenon, post duonjarcento, en Moskvo. Pro neonlampoj, lia vizaĝo aspektis pli laca kaj al mia insisto por ke li renkontu Jevtuŝenkon, Kadare respondis indiferentece. Eble, mi pligravigis la aferon. La situacio solviĝis, kiam mi rimarkis ke la rusa poeto malfermis la postan pordeton de la taksio kaj tuj ekveturis. Ankaŭ ni enaŭtiĝis en luksa veturilo, ŝoforita de amiko de nia ambasadejo. Alvenis ankaŭ la kameraisto por fiksi, de ene, ĉi vojaĝon.

La vojo ĝis la hotelo estis longa, je unu horon disde la centro. Ni veturis senparolante. Grupo de filmistoj el Tirana ŝtata televido estis alveninta por pretigi dokumentaron pri Kadare en Moskvo, grava stacio en la vivo kaj verkado de nia elstara verkisto..



Ankaŭ mi aliĝis, laŭ deziro de Kadare. En unu de antaŭtagmezoj niaj, ĉe barkafejo "Juvenilia" en Tirana, mi estis sugestinta, ke nepre ni devus filmi ankaŭ en Moskvo. Kaj jen, post monato, junio 2010, mi vojaĝas tra Moskvo kun Kadare, ankaŭ kun 22 - jara Kadare de "La Krepusko".

Tiom multfoje mi legis tiun romanon, kiom nun ŝajnis min, ke mi konis la stratojn, bulvarojn, stacidomojn, metroojn, monumentojn. Ĉiujn rolantojn, ties dialogojn. En ĉi tiu senfina urbo, kie mi piediris unuafoje, ŝajnis min ke la solaj memoraĵoj kiuj ligis min kun ĝi, estis ja la paĝoj de ĉi tiu romano.

Tio estis la kialo, certe, ke mi insistis alveni ĝis ĉi tie. La morgaŭan matenon, ni iris al Instituto "Gorkij", kies aspektoj estis fiksitaj en la filmo de reĝisoro Piro Milkani <sup>5</sup>. Sed en mia menso plurestis la lasta tago, impresoj kiujn neniu kamerao apenaŭ povis kapti. Mi insistis tiam iri al la vilao de Pasternak, en Peredelkino. Devus rememori mem Kadare, probable, sed li, dum la tuta tempo de filmado, restis tute indiferenta, ĉu filmo fariĝis por alia verkisto, ne por li..Dume, la grupo de filmistoj, apenaŭ estis antaŭvidinta ĉi halton en la filmo. Mi rememoris pri tio en la aŭtilo de ambasadoro, kiu ege ĝojis ke ni irus al Peredelkino. Tial, mi bedaŭrinde rakontis lin pri mesaĝo sendita al mi de unu el ties subuloj, kiam mi interesiĝis pri vilao de Pasternak.

*"Kial Kadare iru al la vilao de Pasternak? Ĉu serĉi la ostojn de Pasternak?"- skribis min tiu diplomato. Kaj pensu, ke li estis same studinta en Instituto "Gorkij"!"*

Post iom da tempo, antaŭ ni aperis la vilao de Pasternak. Mi estis vidinta ĝin dekfojojn en fotoj, filmoj, videoj. En ĉiuj sezonoj. Nun estis junio, verdeco kaj floroj kovris ĉion. La unua, alproksimiĝis ĉe la pordo de vilao, Kadare, kiu tutan vojon parolis neniun vorton, sed nun subite ekvigliĝis. Kaj komencis paroli ruse kun sinjorino, atendinta nin. Kadare estis dirante ŝin ke "li konis kaj renkontis en Parizo kelkfoje, Ira Emeljanova-n".

Mi sentis tuj ke io embarasiĝis. Kadare ne sciis ke la sinjorino, direktorino de domo-muzeo, estis edzino de filo de Pasternak, el unua edziĝo. Dum Ira

>>>



Emeljanova estis filino de amatino de Pasternak. Mi aŭskultis ke ŝi parolis neĝentile, preskaŭ kolere.

*"Ona sumashedĉaja- Ŝi estas freneza. Oni ne akceptas ŝin ĉi tie. Certel!"*

Kadare skandaliĝis pro tia konduto. Li dorsoturnis ŝin kaj eniris. Kadare ne povus scii la kialon de tia stranga konduto. Por mi estis evidenta: plurfoje mi travivis tion en Tirana. Ofte, inter eldonistoj kaj heredintoj de verkistoj kaj tradukistoj, ne plu vivintaj. Ankaŭ Pasternak ankoraŭ ne eldonis sian kompletan verkaron. Certe, malkonsentoj inter liaj proksimuloj pro propretaj aferoj kaj koleretoj.

Ni supreniris, Estis dormoĉambro. Tro da silento. Ĉe la pordo pendis surmure la ĉapelo, palto kaj gumbotoj. Ili enviciĝis laŭ linio kaj ŝajnis, kvazaŭ Pasternak staris surpiede, dorsoturnante nin. Kvazaŭ ni enirus mortan areon. Mi turniĝis al Kadare kaj konstatis ke lia vizaĝo akiris purpuran koloron.

Ni subiris silente kaj troviĝis sur la unua etaĝo, ĉe la ĉambro kie forpasis Pasternak. Tie li ekkuŝis kaj neniam plu iris al sia dormoĉambro. Surlite, ĉiun tagon, oni ŝanĝis freŝan florbukedon. Surmure pendis du pentraĵoj de sia patro, Leonid Pasternak, amiko de Tolstoj.

Elirinte, la sinjorino profitokazis alproksimiĝi al Kadare kaj invitis nin iri al la tombo de Pasternak. Ni ĉiuj ekiris tien, kvazaŭ funebra procesio. Neniu parolis. Post ducent metroj, aperis tomboŝtonoj. Fronte de tomboj, estis la somera sidejo de patriarĥo de Rusio. Ĉe la tomboŝtono de Pasternak estis gravurita basoreliefo. Ni ĉiuj eksidis sur ligna benko. La silenton rompis nur la sinjorino, kiu, kvazaŭ por pardonpeti pro sia konduto, rakontis nin ion, kion ŝi diradis ne al ĉiu persono. Iufoje, kiam oni estis ŝanĝinta putrigitan trabon de benko, kie ni sidis, oni trovis subaŭskultilon, profunde de ĝi. Se la trabo ne rompiĝus, apenaŭ oni eksciis pri tio, kion faris KGB!

Ni revenis hotelon tre malfrue. Kadare iris al sia ĉambro, dum mi restis en la salono. Post nur duonhoro, li estis venante je mia direkto. Li ne povis dormeti posttagmeze. Eble, pro tuto li vidis kaj aŭdis en Peredelkino. Li eksidis ĉirkaŭ la tablo kun mi en la sola barkafejo, kiu estis en angulo de salono. Poste, ĉe akceptejo, mi rimarkis virinon tutsimila al Helena Kadare. Ŝi babilis kun akceptistino kaj mi ne povis distingi ties vizaĝon. Kiel Euridicja kun Orfeo, diris mi ŝerce. Ne kaptumu!

Dum li subite, rememoris ke la televidilo en la

ĉambro ne funkciis kaj petis min helpi iel. Ne plilongigante, ni prenis lifton kaj supreniris. Ĵus enirinte ĉambron, mi konstatis ke antena kablo estis falinda surplanke. Mi prenis ĝin kaj surmetis en sia loko. Kiam ekrana lumo enverŝiĝis al nia vizaĝoj, atentigis nin sekvencoj de nigra-blanka filmo. Sur unua plano: portreto de Pasternako. Poste, tiu de Anna Ahmatova. Post kelkaj sekvencoj, ankaŭ de ambaŭ ili. Estis dokumentara filmo pri la vivo de Pasternako.

Tio ŝajnis tiel nekredibla! Tuto, fine de tago dediĉita nur al Pasternak. Kvazaŭ ĝi estis scenaro kaj ni obeis ĝin punktpunkte.

Ni restis rigidaj, ne parolante eĉ duonvorton, ĝis kiam la filmo finiĝis. Pli poste, mi estas konversaciinta multajn fojojn kun Kadare pri tiu magia momento. Por konvinki nin ke tuto ĉi tio estis sonĝo, probable? Kaj kiel tio okazis? Kial ĝi koincidis? Kiel ni troviĝis ĝuste tiun momenton, kiam oni elsendis la filmon per la konata rusa kanalo "Kulturo"? Ne estas respondo. Apenaŭ povas ekzisti, eble. La sorto igis min ĉeesti en areo intermedia. Kie plektiĝis tempoj, lokoj, eventoj, rolantoj.

Tial, kiam Kadare enmanigis min la unuajn paĝojn de nova libro, tri jarojn antaŭe, min ŝajnis, kvazaŭ mi estus tie, en tiu hotelego, je digna nomo por ĝi, "Kosmoso". Kaj la unua kozo, kiu venis en mia menso, estis ke mi jam trovis la inicmotivon de ĉi tiu libro. Mi kunestis kun aŭtoro en tiuj lokoj, pri kiuj oni skribis en manuskripto kaj tio ŝajnis min tiel natura pensi tiamaniere. Sed, ĉiun tagon pasinta, ĉi penso foriĝis de mi.

Ĉi libro incisis verŝajne de romano "Krepusko", aŭ de poemoj pri Loro, pri...Aŭ, ekde la momento kiam la redaktoro de lia unua libro diris lin, "kial vi ne havas poemon pri Moskvo?"<sup>6</sup> Ankoraŭ pli frue, eble. Ekde naskiĝo de verkisto mem. Ĉar Pasternak ĉi tie estas kvazaŭ lia frato, Kadare. Kun bela sorto, nature. Je nia bonŝanco. Je ĉiuj mondaj lingvoj.

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanio

<sup>1</sup> *Monde konata albana verkisto*

<sup>2</sup> *Monde konata sovetia verkisto*

<sup>3</sup> *Renoma eldonisto albana*

<sup>4</sup> *Renoma sovetia-rusa poeto*

<sup>5</sup> *Elstara albana reĝisoro*

<sup>6</sup> *Temas pri poemaro de Kadare verkita ruslingve kaj publikigita en Moskvo en jaro 1958*

**V**irino ankoraŭ juneca, blondiĝinta pro zorgoj, kvindeksepjara rakontas:



"Kiam mi fariĝis pensiulino, mi havis la senton, ke malfermiĝis antaŭ mi la mondo. Mi ne havis hundon, nek katon, mi devis nur pri mi okupiĝi. Mi realigis la du grandajn dezirojn de mia vivo: aĉetis ruĝan ĉapelon kaj ellernis skiadi. La ruĝan ĉapelon poste mi metis en la fundon de la ŝranko, ĉar amikinoj komencis karesnomi min „trompludistino”, nome ke mi metas ruĝon sur karoon, sed la skiado iom post iom fariĝis por mi pasio.

Mi komencis sur la pli plataj deklivoj de Normafa. Komence mia trejnisto ne atendis multon de mi, li proponis, ke mi faru kelkajn fortajn trejnoj kaj rezignu, sed mi persistis, kuraĝis ekiri al pli kaj pli krutajn deklivojn. Fine pasintjare mi decidis, ke mi iros en Austrion kaj faros provon sur la grandaj alpaj skiejoj. Mi pagis por naŭtaga restado en Tirol, kaj aĉetis duamane (uzitan) admirindan bluan skikostumon (overalon) unupecan kun multaj poŝoj, multaj zipoj, remburita ĉe la genuoj, faldumita ĉe maleoloj, unuvorte ĝi estis belega peco. Kaj vespere – ja mi ne deziris tro multajn vidajn atestantojn, mi staris en la Tubenthal-a skiejo. Dio mia, mi, Valéria Kovács el la strato Népszínház, malantaŭa korto, helika ŝtuparo, profunde spiris kaj ekiris. Komence ĉio iris glate. Antaŭ la granda krutaĵo mi ekhaltis en etan ripozlokon por anheli. Sed mi bezonis ne nur anheli, sed ankaŭ alion fari, eble mi frostetis sube, ĉar la afero ŝajnis tre urĝa. Jam mi ne povis reiri al la gastejo, mi ĉirkaŭrigardis, vidis nenion, kaŭriĝis. Estis nur unu problemo, ke mian belegan skivestaĵon ne eblis dividi, mi povis demeti nur la tuton, tirante la puloveron ĝis la kolo. Tiamaniere, ekde la ŝultroj ĝis la maleoloj mi montriĝis en plena mia natura beleco. Unuvorte, mi kaŭriĝis, la afero estis ĝuste en kontinueco, kiam mi konstatis kun la plej granda konsterniĝo, ke la skioj eklitis de sub mi – ŝajne mi

faris malbone la plugilo – pozicion.

Komence mi nur malrapide glitetis, poste mi ekrapidis kaj kun timiga rapideco galopis

malsupren sur la kruta deklivo. Se mi ne volis rompi mian kolon, mi devis ekstarti en la pozicion konforman al la reguloj, kun pulovero ĉe la kolo, kalsoneto kaj skivesto ĉe maleoloj. Kion mi diru, mi jam estis eĉ pli feliĉa Senĉese mi ripetadis enpense:

*Dio mia, se post tio mi plu vivos, donacos mil forintojn por la konstruado de la nova Nacia Teatro.*

Fine mi direktis min al arbusto, ĝi jam ne povis devojiĝi, mia artikolo deartikiĝis, sed per mia sendifekta mano mi povis retiri mian kalsoneton. La montaraj savantoj alvenis kaj akompanis min al la ambulanco.

Sur leda kanapo sidis maljuna viro kun provizora bandaĝo sur la rompita kruro. Per la ruinoj de liaj skioj ĝuste tiam oni bruligis fajron en la forno. Atendante la kuraciston, ni komencis babiladi."

- "Ĉu ankaŭ vi estas komencanto, sinjoro?"

- "Ĉu mi, sinjorino? Mi skiadas de kvardek jaroj, mi estas plurfoja ĉampiono de Malsupra Austrio kaj nun mi vundiĝis la unuan fojon."

- "Kio okazis?"

- "Tio estis la infero mem, sinjorino. Mi glitas malsupren sur la skivojo en mia trankvila ritmo, kiam de malantaŭ ekaperas sorĉistino kun pulovero ĉe kolo, la skikostumo ĉe maleoloj, alie tute senvesta, eĉ la loko de ŝia cekuma operacio videblis, por ne paroli pri alio. Krieganta, kun plena rapideco galopis preter mi. Mi konsterniĝis tiomgrade, ke mi alpuŝiĝis al arbo. Sed mi renkontu nur tiun sorĉistinon! Ĉu ankaŭ vi estas ŝia viktimo, sinjorino?"

- "Ankaŭ mi – mi diras, kaj mi pripensadis, kun kiom da elpreno oni redonus al mi la prezon de la oktaga feriado."

verkis **György Moldova (1934- )** el Hungario  
tradukis kaj sendis **Lenke Szász**, el Rumanio



18 > nur fortan raki-on \*, kie li drinkis ĝis ebriiĝo.

Ambaŭ, la gitaristo kaj la konstruisto, estis renkontitaj denove je la deka de vespero, en la sama loko kiel matene. Unu kun la gitaro surbrake, revenante seniluziite en la hejmo, dum la alia en la aŭtilo duondetruiita kaj sangumita sur la vizaĝo. Li estis kunfrapinta al la kiosko vojrande, sed bonŝance estis savita. Erĉmir, kun kelkaj hazardaj preterpasantoj, alproksimiĝis al la aŭtilo, tiom kara al Bujar, kio nun estis turniĝinta en faltitan malbelaĵon.

La gitaristo estis la ĉefa helpanto por konduki plej baldaŭe al la urĝejo sian unuan najbaron.

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

\* Tradicia balkana alkoholaĵo

## SPIRITAJ PORTALOJ

Homo kaj akvo –  
memoro en la sango  
el la kreado.

\* \* \*

En la vin' estas  
la Spirit' de la vero.  
Aŭ ... la fiasko.

\* \* \*

Ĉevala galop' –  
memoro pri libero.  
Mara ventego.

\* \* \*

Knabina sonĝo –  
Eva en la edeno.  
Iluzia sonĝ'.

\* \* \*

Ino – kreinto  
en la "Arbo de l' vivo".  
Kreint' kaj vojo.

Memor' el fabel' –  
ĉevalo ventrapida.  
Malvarma maro.

\* \* \*

Malfieriĝo  
antaŭ la Dia domo.  
Neĝa espero.

\* \* \*

Multjara urbo –  
venko super la tempo.  
La lumo fluas.

\* \* \*

Nekonata kaj  
konata - nia sankta  
planedo Tero.

\* \* \*

Klaŭno al kiu  
primokas groteske? Ho,  
rigard' en Mi'.

verkis kaj sendis **Elena Popova**  
el Bulgario



**Честит имен ден!  
Здраве, щастие,  
успехи!**

**Felichan nomtagon!  
Sanon, felichon,  
sukcesojn!**



## La Aŭtunaj Muŝoj (parto 8)

**LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)**  
(daŭrigata)

Li levis la ŝultrojn kaj indiferente rediris: "Ĉie estas same..."

"Ĉu vi estis en malliberejo?" ŝi flustris, kunigante la manojn.

"Ses monatojn."

"Kial?"

"Tion nur scias la diablo..."

Li silentis, restis senmova kaj pene findiris:  
"Mi eliris el Moskvo...Iun tagon, mi eniris en ambulancotrajnon kaj la flegistoj kaŝis min ... Mi ankoraŭ havis monon... Kun ili mi vojaĝis dek tagojn... kaj mi piedradis... Sed min trafis tifo. Mi falis sur iun kampon apud Temnaja. Homoj min levprenis. Kelkan tempon mi restis en ilia domo; poste, ĉar alproksimiĝis la Ruĝuloj, ili ektimis kaj mi foriris..."

"Kie estas Cirilo?"

"Li estis malliberigita kune kun mi. Sed li sukcesis fuĝi

## Romano de Irène Némirovsky

kaj reiris kun la gepatroj en Odeson. Oni transdonis al mi leteron dum mi ankoraŭ estis mallibera... Kiam mi eliris, jam de tri semajnoj ili estis foririntaj... Neniam mi havis ŝancon, maljuna Njanjuŝka mia!" li ridetante diris kun sia moka rezigna mieno. "Eĉ en la malliberejo, Cirilo troviĝis en la ĉelo kun bela juna virino, iu Franca aktorino, kaj mi kun maljuna judo."

Li ekridis kaj ĉesis; kvazaŭ mem mirigita de l' obtuza kaj rompita sono de sia voĉo.

Li metis unu vangon sur sian manon kaj suspiris:  
"Mi estas tiel feliĉa esti hejme, Njanjuŝka!" kaj subite li endormiĝis.

Li dormis kelkajn horojn, kaj ŝi restis senmova, sidanta antaŭ li.

Silente fluis larmoj sur ŝia pala maljuna vizaĝo. Iom pli malfrue, ŝi vekis lin, suprenirigis lin en la ĉambron de la infanoj kaj kuŝigis lin.

Li iom deliris. Li laŭtvoĉe parolis, laŭvice tuŝis la lokon inter la stangoj de la lito de Andreo, kie iam pendis la ikono, kaj la kalendaron sur la muro, ankoraŭ





ornamitan de kolora portreto de l' caro, kiel dum sia infanaĝo.

Li fingre montris la paĝon kun la dato 18an de majo 1918, rediris:

"Mi ne komprenas, mi ne komprenas..."

Poste kun rideto li rigardis la latkurtenon, kiu dolĉe balanciĝis, la parkon, la arbojn lumigitajn de la luno kaj tiun lokon apud la fenestro; tie la malnova pargeto iomete enkaviĝis kaj la malforta lunlumo plenigis tiun spacon, kiu iom trembrilis kiel laktoflako.

Kiom da fojoj, dum lia frato dormis, li ellitiĝis kaj daŭre sidis tie sur la planko, aŭskultante la tirharmonikon de l' koĉero, la mallaŭtigitajn ridojn de la servistinoj...

La siringoj forte odoris, kiel ĉi-nokte... Li atente aŭskultis, nevole gvatis la ĝeman tonon de l' tirharmoniko en la silento.

Sed nur obtuza kaj mallaŭta tondrado trairis la aeron de tempo al tempo...

Li restariĝis, tuŝis la ŝultron de Tatjana Ivanovna, kiu sidis apud li en la mallumo.

"Kio estas tio?"

"Mi ne scias. De hieraŭ oni aŭdas ĝin. Tio estas la tondro, eble la maja tondro..."

"Ĉu vere tio?" li diris.

Li subite ridis kaj fikse rigardis ŝin per siaj larĝe malfermitaj okuloj, kiujn la febro heligis kaj kvazaŭ bruligis ilin de iu kruda lumo. "Tio estas la kanono, oldulino mia!... Tion mi ja konjektis... Estis tro bele!..."

Li eligis konfuzajn parolojn miksitajn kun ridoj, kaj li klare diris:

"Ho! trankvile morti en tiu lito!... Mi estas laca..."

En la mateno la febro jam falis; li deziris ellitiĝi, eliri en la parkon, kiel antaŭe spiri la freŝan printempan aeron, varmetan kaj puran... Nur tio ne ŝanĝiĝis...

La forlasita parko plena de sovaĝaj herboj aspektis mizera kaj trista.

Li eniris en la etan pavilonon, surplanken kuŝiĝis, maŝine ludis kun la splitoj de la pentritaj vitroj, rigardis la domon tra la vitropecoj.

Tiel pasis la tago.

Ĉirkaŭ la vespero, li revenis hejmen.

Estis bela krepusko, klara kaj trankvila kiel la antaŭtago.

Post ĉirkaŭiro, li laŭiris la basenon. En aŭtuno la arbustoj, kiuj borderis ĝin, perdis siajn foliojn kaj ĝi estis ankoraŭ kovrita de dika tavolo el mortaj folioj restantaj sub la glacio.

La lilakfloroj faladis kiel malpeza pluvo; oni apenaŭ ekvidis la nigran akvon, kiu dise malforte flagretis.

Li revenis al la domo kaj ree supreniris en la dormoĉambron de la infanoj.

Antaŭ la malfermita fenestro, Tatjana Ivanovna jam metis la manĝilaron.

Li rekonis unu el la etaj tablotukoj el fajna tolo speciale rezervitaj por la infanoj, kiam ili manĝis en sia dormoĉambro dum mallongaj malsanoj, kaj la forketon, la tranĉilon el malnova orarĝento, la malnovan senbriligitan metalglaseton.

(daŭrigota)

tradukis **MIKELO (Michel Deryger)**, el Francio

**17 >** ultravoĉojn por orienti sin en la spaco. Ĝuste tion li instruis al ili: moviĝi en la mallumo per sonoj, kaj tion ili lernis tre rapide. Ili tiam ne plu bezonis sian vidkapablon kaj do ne plu bezonis la lumon de la lampiro.

- Nun vi povas alvoki la estron de la vespoj - diris Karmel kiam li vidis ke ili estas pretaj. Kaj tiel ili faris. - vi povas foriri - diris la manto serioze al la vespoj, kaj estis klare, ke tiu "vi povas" vere signifas "vi devas". La fi-vespero malaperis kun fulma rapideco sen diri eĉ unu vorton. Kaj paco kaj trankvileco revenis al la arbareto.

- Ĉu ankaŭ via doloro malaperis, Maurizio? - demandis la skaraba rakontanto!

Dum momento mi malaltigis mian rigardon,


karesante mian ventron kiu finfine ne plu doloris, sed mi ne havis la tempon respondi ĉar, levante denove la okulojn mi ekrimarkis ke la du skaraboj ankaŭ estis malaperintaj! Domaĝe! Mi ŝatus demandi pri la kiroptero! Ĉu ili rekompencis lin pro la ricevita helpo? Mi ne scias. Verŝajne mi diros al vi venontfoje, kiam mi denove iros al tiu arbareto por manĝi tiajn bongustajn mirtelojn.

verkis **Maurizio Brucco**, el Italio

**MONTAIGNE - Eseoj**  
**Libro Unu - ĉapitro 28**  
**Pri Amikeco**

*(ĉapitro kie li elvokas sian amikecon kun Etienne de La Boétie; en tiuj eltiraĵoj bone vidiĝas la sociaj apartaĵoj de lia epoko !)*

**E**stas nenio al kio ŝajne naturo esti nin pli alvojiginta ol al socieco. Kaj diras Aristotelo, ke leĝfarantoj bonaj pli zorgis pri amikeco ol pri justo. Nu la plej ekstrema punkto de ties perfekto estas tiu ĉi ligo. Ĉar ĉiuj tiuj, kiujn volupto aŭ profito, kaj la publika aŭ privata bezono, alforĝas kaj nutras, estas pro tio malpli belaj kaj malavaraj kaj des malpli amikecaj, ju pli ili miksas alian kaŭzon kaj celon kaj frukton en amikeco ol tiu mem.



Nek tiuj kvar specoj malnovaj : natura, socia, gasta, amora, konvenas, nek aparte nek kunlige.

De la infanoj al

patroj, temas pli bone respekto. Amikeco nutras sin el komunikado, kio ne povas ĉeesti inter ili, pro tro granda diferenco, kaj ofendus foje la devojn naturajn.

....

Se kompari al ĝi la korsenton al virinoj, kvankam tiu naskiĝas el nia propra elekto, ankaŭ ĝin oni ne povas sidigi en tiu rolo. Ties fajro, mi konfesas,

*neque enim est dea nescia nostri*  
*Quæ dulcem curis miscet amaritiam, (Catulle)*

estas pli agema, pli bruliga kaj pli akra. Sed estas fajro aŭdaca kaj ventkapa, fluema kaj diversa, fajro febreca, ema je sturmoj kaj paciĝoj, kaj kiu kaptas nin nur je unu punkto. Ĉe amikeco temas pri varmo ĝenerala kaj universala, kaj dume modera kaj egala, varmo konstanta kaj sida, ĉiom milda kaj glata, kiu neniom estas akra nek pikvunda. Kaj cetere ĉe amo estas nur feroca deziro por tio, kio nin fuĝas :

*Come segue la lepre il cacciatore*  
*Al freddo, al caldo, alla montagna, al lito;*  
*Ne più l'estima poi che presa vede,*  
*El sol dietro a chi fugge affreta il piede. (Arioste)*

....

Koncerne geedziĝojn, krom la fakto ke estas ĝi kontrakto, kies nur la eniro estas libera (ties daŭro estante enda kaj truda, dependante cetere nur de nia volo), kaj kontrakto, kiu plej kutime faratas por aliaj celoj, tien eniĝas mil bobenoj fremdaj por malimpliki, sufiĉaj por rompi la fadenon kaj malheliĝi la fluon de arda korsento; dum en amikeco ne kuŝas afero kaj intereso alia ol ĝi mem. Aldone ke, se vere paroli, la kutimaj kapabloj virinaj ne sufiĉas al tiu intertrakto kaj komunikado, nutristino tiun sanktan ligan; nek ilia animo aspektas sufiĉe firma por elteni la enbrakigon de nodo tiom strikta kaj tiom daŭra. Kaj ja, krom tio, se povus konstruiĝi tia kunuleco, libera kaj vola, kie ne nur la animoj havus tiun tutan ĝuon, sed plie kie korpoj havus parton en la alianco, kie la homo estus engaĝita tutparte, certas ke la amikeco estus pli plena kaj abunda.

....

L'antikva Menandro diradis tiun feliĉa, kiu estas povinta eĉ nur renkonti la ŝajnon de amiko. Li ja estis prava tion diri, eĉ se li da tio spertis. Ĉar, por paroli vere, se mi komparas la tutan ceteron de mia vivo, kvankam mi per dia favoro ĝin pasigis dolĉa, facila, kaj krom la perdo de tia amiko, sena de peza aflikto, plena je mensotrankvilo, estante mi kiel enspezon preninta miajn naturajn oportunaĵojn kaj originajn, ne sopirante al pliaj; se mi komparas ĝin, mi diras, en komparo al la nuraj kvar jaroj, kiuj estis donitaj al mi por ĝui la dolĉan kuneston kaj kunulecon de tiu persono, tio estas nura fumo, tio estas nur nokto malhela kaj teda. De la tago kiam mi perdis lin

*quem semper acerbum,*  
*Semper honoratum (sic, Dii, voluistis !) habebō,*  
*(Virgilo)*

mi faras nenion ol treniĝi en koroŝlim', kaj l'plezuroj eĉ al mi riceveblaj, anstataŭ min konsoli, duobligas al mi la bedaŭron pro lia perdo. Ni estis duope en ĉio : mi sentas kvazaŭ mi rabas al li lian parton

*Nec fas esse ulla me voluptate hic frui,*  
*Decrevi, tanstisper dum ille abest meus particeps.*  
*(Terentio)*

Mi estis jam tiom akomodiginta kaj kutimigita esti dua ĉie, ke ŝajnas al mi kvazaŭ mi nun estas nur duone.

esperantigis kaj sendis Roland Platteau, el Francio



**L**aŭ la mezepokaj religiaj konceptoj de la okcidenta mondo, estis enmense registritaj, kiel mortindaj pekoj, kelkaj homaj ecoj kaj emoj, kiuj nuntempe estas konsiderataj kiel ordinaraj meritoj, se ne pozitivaj homaj karakterizaĵoj.



En la tre antikva mondo, en la praaj epokoj en kiuj mi kutimas vagi, la diaj pesiloj mezuris la pezon de la homaj pekoj alimaniere, mi dirus pli juste, pli konforme al la naturaj inklinoj kaj emoj. Por ekzemplo, ŝajnas, ke la antikvaj dioj ne pardonis

facile ignoradon de la amo, de la amdeziro. Estis ne nur Afrodita (Αφροδίτη), la diino de la amo, sed multaj ankoraŭ dioj, kiuj juĝis severe tian moralan pekon, kaj mi montros, ke ludis ĉefan rolon tiu dia ordo en la vivo kaj la morto de miaj amataj herooj, Narciso kaj Eĥoa, pri kiuj mi rakontos ĉi-sube.

Narciso estis filo de la dio-rivero Cefizo (Κηφισός) kaj de la nimfo Lejriopa (Λειριώπη). Tiel, li grandiĝis en la libera naturo, en la arbaroj, kiujn li multe ŝatis. Li estis eksterordinare bela viro, afabla, bonkora, tamen lia naturo estis tia, ke li preferis la solecon, li evitis rilatojn kun aliaj homoj. Li ne estis aroganta, li ne suferis pro troa memfido, li ne pelis la homojn, li nur ignoris ilin. Kial? eble ankaŭ li mem ne sciis, mi jam diris, tia estis lia naturo.

Tamen, lia granda beleco ne povis lasi indiferentaj la virinojn, kiuj ofte lin renkontis dum lia senfina vagado en la kampoj, valoj kaj arbaroj. Estis multaj mortemulinoj, sed precipe estis nimfoj, tiuj belegaj duondiinoj, kiuj vivis en la valoj kaj arbaroj. Tamen, ĉiuj belulinoj vane klopodis alproksimiĝi al la stranga junulo, li tute ne atentis ilin.

Inter tiuj virinoj estis belega virgulino, nomata Eĥoa. Ankaŭ Eĥoa vivis en la arbaro; ŝi estis edukita de la nimfoj, ŝi estis amata lernantino de la Muzoj (Μούσαι), kiuj instruis al ŝi multon el la belartoj. Tiel, Eĥoa kantis bele kaj kun eksterordinara virtuozece ludis la ŝalmon kaj la sirinkson. Kiam ŝi ludis la sirinkson, kolektiĝis ĉirkaŭ ŝi la plej belsonaj kantobirdoj, kiuj akompanis ŝin, kreante magian, paradizan konsonancon; kaj kiam Eĥoa kantis, ĉio silentis kaj akompanis ŝin, en etoso dia, nur la brueto de la fontfluaĵoj, la murmureto de la rojfluado, kaj ankaŭ la susurado de la foliaroj.

Kiam la homoj parolis pri Eĥoa, diradis, ke pri ŝia fino kulpis precipe la envio de Pajno (Παν), la dio de la

paŝtistoj, tiu kiu elpensis kaj elfaris la ŝalmon, la muzikilon, kies voĉo plaĉis multe ne nur al la homoj, sed al ĉiuj dioj kaj diaĵoj de la naturo. Tamen, pri tio mi parolos pli sube.



Ankaŭ la bela virgulino kondukis iom strange. Malgraŭ sia beleco, malgraŭ sia nekontraŭstarebla allogo, ŝatis pli multe la muzikon ol la homoj, ŝi evitis preskaŭ ĉiujn virojn kaj energie rifuzis al mortuloj kaj senmortuloj sian amon. Tamen, tio ŝanĝiĝis, tuj kiam ŝi ekvidis por la unua fojo Narcison. Tiam, subite la belulino sentis sin fulmobatita! Estis, verŝajne tiu fola, juna dio, Eroso (Έρως), kiu la ĝustan momenton trafis ŝin per sia sago, eble estis veninta la fatala momento por nia romantika heroino, mi ne scias kio estis, mi nur scias, ke, fakte, Eĥoa fulme enamiĝis arde al Narciso. Tamen, ĉiufoje kiam ŝi provis alproksimiĝi kaj paroli al li, la junulo, ignorante ŝian ĉarmon kaj ŝiajn talentojn, preterpasis silente. Eĥoa, ne povante resti malproksime de li, sekvadis lin de malproksime en lia senĉesa vagado al la plej lontanaj lokoj de la densaj arbaroj.

Mi jam diris, ke Pajno sentis envion al Eĥoa pro ties talento por la ŝalmoludado, sed tiun senton de la dio venkis tre ofte lia amo al la junulino, ĉar, ankaŭ la stranga dio estis enamiĝinta al ŝi. Tiel, Eĥoa, senvole kaŭzis la koleron de la dioj, ne nur de Pajno, sed precipe de Afrodita. Mi diris en la komenco de tiu ĉi rakontado, ke tiuj praaj dioj ne pardonis al la homoj la daŭran ignoradon de la amo. Nu, Afrodita estis oferinta al Eĥoa tre valorajn donacojn, la amon de multaj tre belaj, noblaj kaj interesaj viroj, tamen la junulino ofendis multfoje la diinon, ignorante ties donacojn kaj enamiĝinte al la tute netaŭga Narciso, la sola viro kiu povis rifuzi ŝian amon. Kaj estis ne nur tio, la homoj diradis ankaŭ, ke iam Zeŭso (Ζεὺς), la reĝo de la dioj, bezonis la servon de la belvoĉa Eĥoa. Li celis elŝteliĝi el sia palaco por sekrete renkontiĝi kun unu el siaj multaj amorantinoj. Li invitis, do, Eĥoan kaj petis de ŝi kanti kaj ludi la ŝalmon al Hera (Ήρα),







lia ĵaluza edzino, kiu multe ŝatis la muzikon de la junulino. La granda dio deziris tiele trompi Heran, por nerimarkite foriri de la hejmo. Li sukcesis je tio, tamen, pli poste, Hera eksciis kion ŝia edzo faris, kiun artifikon li uzis tiun fojon kaj kiu helpis lin, sed, povante fari nenion kontraŭ la granda dio, tute maljuste, ŝi forte ekindignis kontraŭ la senkulpa Eĥoa kaj ŝin punis senindulge.

Estis, do, Pajno kaj Afrodita kaj Hera, grupo terura, kies kolero povus eĉ monton disfaliĝi. Kiu punis Eĥoan? ĉu unu el tiuj dioj, ĉu ĉiuj kune? tio ne gravas, gravas nur la terura puno. Eĥoa ne plu povus paroli, ŝi ne povus diri ion ajn, ŝi nur povus ripeti, rediri la lastajn sonojn de ĉiu voĉo kiun ŝi aŭdus!

Oni pensus, ke la malfeliĉa Eĥoa ne povus elteni tian turmenton, tamen ŝin tenis viva ŝia flama amo al Narciso, kiun ŝi ĉiam deziris sekvi kaj rigardi de malproksime. Ŝi, do, daŭrigis fari tion kaj paciencie atentis ĉiun lian vorton, kies la finan silabon ŝi ripetis plenĝoje.

Narciso, sciante nenion pri Eĥoa, pri ĉiu ajn alia homo, daŭrigis sian solecan, sencelan vagadon kaj sian solan amatan okupon, la ĉasadon. Unu tagon, sekvante rapidpedan cervon, li perdis la vojon, siajn konatajn padojn, li devojiĝis al densa, sed mirinda, nekonata al li loko de la arbaro. Troviĝinte tie, li tuj forgesis la cervon kaj la ĉasadon, li staris ensorĉite, li avide ĝuadis, per la okuloj tute malfermitaj, la mirindan naturbilon. "Ho, grandaj dioj!", li vokis senkonscie kaj tuj aŭdis "dioj!"; "kia beleco!", li vokis denove, kaj aŭdis "eco!". Estis ja la dolĉa voĉo de Eĥoa, de Eĥoa kiu estis tie, kiu estis apude. Narciso ne estis sola, la malfeliĉa junulino restis iom malproksime, kaŝita sub vepro, ŝi deziris nur tion fari, rigardi de malproksime sian karan amaton. Tamen, Narciso nenion sciis, nenion komprenis, li restis en sia silenta, soleca mondo.

Mi devas ĉi-tie diri, ke senvole Narciso estis, same kiel Eĥoa, ofendinta Afroditan. Mi aldonu, ke la kutimajn kolektiĝojn de la belegaj nimfoj, ofte partoprenis la diino. Ŝi diskutis kun ili pri ĉio, ŝi konsilis

la pli junajn duondiinojn pri la aferoj de la amo, ŝi instruis al ili la amararton, ŝi montris al ili ĉion kion la virinoj devas scii por ĉarmi, allogi kaj altiri la virojn, por vekti ĉiumomente la viran ampasion. En tiuj renkontiĝoj, Afrodita aŭskultis la oftajn plendojn de multaj nimfoj, kies ĉiaj am-artifiko ne sufiĉis por allogi Narcison. Komprenable, Afrodita estis indigninta, ŝi estis decidinta severe puni Narcison, sed, ĉar ŝi rezervis por li punon neordinaran, ŝi atendis la taŭgan momenton. Estis, do, ne nur Eĥoa, sed ankaŭ la nevidebla diino, kiu sekvis Narcison en la mirinda loko kiun li malkovris.

La junulo, ensorĉite promenadis en sia ŝajne privata, magia teritorio kaj post nelonge li distingis mallarĝan pasejon inter grandaj arbotrunkoj kaj altaj rokoj. Li trapasis la mallarĝejon kaj li troviĝis antaŭ pejzaĝo magia, en loko nepriskribeble bela, verŝajne neniam atingita de viva estaĵo. Regis tie sunlumo nebrila, mi diru modesta, duonmortinta, ombrata de la obtuza moviĝo de la plej altaj foliaroj, de la flugado de sennombraj diverskoloraj papilioj. Estis medio evidente kreita nur por dioj. Kaj estis tie, en la centro de la mirinda terspaco, ĉirkaŭita de densa, diverstona verdaĵo, estis malgranda lago, kun akvo tute trankvila, ebena, klara, senmova!

Narciso, surprizite staris kvazaŭ ŝtonigita kaj Afrodita sciis, ke estis veninta la ĝusta momento. Ŝi okulsignis al sia sekvanto, la fluganta sia filo, Eroso, kaj la ludema ruzulo levis la arkon, celis kaj trafis per sia neeraripova sago la junulon. Tiu sago estis, kaj ĝis nun ankoraŭ estas, efika, sed nesentebila. Narciso sentis nenion, li restis iom senmova kaj tuj poste li kliniĝis super la tute trankvila akvo de la lago, li apogis sin sur plata ŝtono kaj rigardis de proksime la tute ebenan supraĵon. Tie, kvazaŭ mirakle, Narciso fascinite ekvidis la klare spegulitan sian belegan vizaĝon. En la komenco estis embaraso, poste estis konfuzo, paralizo de liaj sensoj. Li sentis nenion, li komprenis nenion, li povis nur avide rigardi, kaj vidante sur la akva supraĵo la dian sian figuron, li eksentis la ardan amon, kiu, en nur unu momento, ekkonkeris lian tutan eston.

Jes, Narciso estis enamiĝinta al si mem! Li estis pasie enamiĝinta, li ne povis detiri siajn okulojn de la adorinda bildo. Momenton pli poste li kliniĝis ankoraŭ



pli multe, li ekdeziris kisi la pasivekajn lipojn de sia amato, tamen kiam li tuŝis la akvon, la bildo malaperis. Estis ia maltrankvilo sur la supraĵo de la lago, tia, ke Narciso tuj fortiĝis. Li restis tute senmova, eĉ sian spiradon li provis reteni, li estis en plena malespero, ĝis kiam ĉesis ĉia ajn moveto sur la akva spegulo, ĝis kiam la amata figuro aperis denove. Narciso sciis nun, ke li povis nenion fari, krom rigardi. Rigardi la amatan vizaĝon kaj el tio ĉerpi la solan amplezuron destinitan por li. Do, tion faris Narciso, nur tion. La horoj pasis, la tagoj pasis, sed senmove li restis tie, sur sia pozicio, li nur rigardis avide la akvan spegulon; li ne manĝis, li ne trinkis, ne dormis kaj iom post-iome li komencis perdi siajn fortojn. Kiam li ne plu povis kliniĝi super la akvo, falis sur la bordon kaj tie malrapide li velkis kiel la floroj, li mortis!

Sola atestanto de tiu dramo estis la malfeliĉa Eĥoa, la muta belulino, kiu, tute senpova, kaŝite restis iom malproksime. Ŝi observadis sian amatan viron kaj ŝi nur povis ripeti la lastan sonon de ĉiu lia veo, de ĉiu lia suspiro. Kiam ŝi vidis ke Narciso falis senspire, ke li restis tute senmova, morta, Eĥoa kuris apud li. Estis distanco de nur kelkaj paŝoj, tamen kiam li atingis la lagbordon, Narciso ne estis tie, li estis malaperinta kaj sur lia pozicio estis kreskinta belega aromfloro! Jes, Narciso iĝis floro, li iĝis belodora floro, la amata al ni ĉiuj narciso, tiu, kiu en la fora antikveco estis la sankta floro de la dioj de Hadeso (Αἰδης), simbolo de la eluziteco kaj la morto.

Eĥoa, karesante la sablon sur kiu kuŝis Narciso, kisante kaj rekisante la belan floron, silente, mute, senvoĉe ploradis, lamentadis longe, ĝis kiam ŝi subite ŝtoiniĝis! Jes, Eĥoa aliformiĝis en rokon, eble en multajn rokojn, kai ekde tiam, ĉiufoje kiam pasanto diras ion, li aŭdas la rediron de sia vortofino.

Kiam mi estis tre juna, kiam naiveco kaj troa sentimentaleco estis ankoraŭ pardonataj al mi, mi ofte iris al loko, en kiu mi povis diskuti kun mia amata Eĥoa. Estas vere, ke ŝi nur ripetis ion el miaj diroj, tamen, kreu karaj legantoj, ke el tio mi povis eltiri multon ankoraŭ, mi aŭskultis ŝian tristan rakontadon pri sia amara idilio, pri sia maljusta puno, eĉ ofte mi aŭdis iom el ŝia anĝela kantado.

Pri Narciso mi povas malmulton aldoni. Lia nomo restis en la vortaroj de multaj lingvoj, kiel karakterizaĵo de personoj, kiuj havas tre altan opinion pri si, kiuj sin admiras, sin amas, sin adoras. Tamen, tiaj personoj, ordinaraj politikistoj, aktoroj, diversaj artistoj k.a. havas nenian rilaton kun mia Narciso. Tiuj ĉi elektas sian konduton, ili ludas rolojn, ili ne estas trafitaĵoj de ia dia malbeno. Do, bonvolu, karaj, ne kompari, ne rilatigi la nuntempajn kanajlajn narcisojn kun mia malfeliĉa, ĉasta, virta, puranima hetroo!

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio

## “GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO”

verkis **Maurizio Brucco**, el Italio

### Papavo kaj Pikiloj

**T**iumatene la emo manĝi sukoplenajn mirtelojn vekis min. Nedevo labori, ĉar tiu estis la dimanĉa tago, post nelonga pripenso mi decidis ekskursi al proksima arbareto por kolekti kaj gustumi ilin. Tiam mi eklernis kiel facile oni povas konfuziĝi kiam oni devas distingi inter manĝeblaj kaj venenaj beroj.



Kiom da tiaj toksin-riĉaj fruktoj mi voris mi ne memoras, tute certe la halucinoj ne malfruis alveni. Mi eksidis surtere ĉe majesta kverko, manprenanta mian


ventron, kiu ege doloris. Kaj jen subite, neatendite, du nigraj skaraboj alproksimiĝis al mi. Kia surprizo estis povi aŭdi ilin paroli la homan!

Jes miaj karaj, verŝajne vi ne kredos min, sed tio vere okazis al mi, pro tiuj mirtel-similaj karnecaj beroj, kiuj antaŭ nelonge kontentigis mian kvazaŭ-gravidecan deziregon.

“Saluton Maurizio” diris la maljuna skarabo kiam ĝi ekrimarkis min, “vi devus esti pli singarda, iuj el la fruktoj de ĉi tiu bosketo povus eĉ mortigi onin pro la veneno kiun ili enhavas. Bonŝance, tiuj, kiujn vi manĝis, ne estas tiel morte danĝeraj, kaj viaj halucinoj daŭros nur dum kelkaj horoj. Mi estis promenanta kun mia juna nepo en la ĉirkaŭaĵo kiam ni aŭdis vin mallaŭte ĝemi, tiel ni trovis vin. Bedaŭrinde mi povas fari nenion nun por helpi vin, krom eble, rakonti al vi historieton, almenaŭ tio povus deturni vian atenton de la doloro kiu suferigas vin. Ĉu vi emas aŭskulti?”

Mi kapjesis silente.

“Bone, do, antaŭ longe, ĝuste ĉi tie, kie nun vi estas, sub ĉi tiu belega kverko, kune vivis grupo de



insektoj: tri skaraboj (unu el ili estis mia avo), papilio multkolora, preĝanta manto, familio da limakoj, milpiedulo, kaj lampiro. Ĉu ili feliĉis? Nu, antaŭ ol respondi al tiu demando, endas scii kio estas feliĉeco. Oni ne facile kapablas difini ĝin, ĉu ne? kiel priskribi ĝin? Multaj klopodis klarigi la signifon de tiu vorto, eble ili ĉiuj pravas. Laŭ la insekta vidpunkto, kontenteco estas lo stato de tiuj, kies ventro estas plena. Senerare mi povas deklari, ke la nutraĵo ne mankis al ili. Ili neniam malsatis. Ĉiutage ĉi tiu arbareto bonvoleme donacis ĉion, kion ili bezonis. Kaj akvo ne malestas ĉi tie: la rivereto kiu transiras ĉi tiun verdan edenon neniam sekiĝas, eĉ dum la varma somero. Sendube ilia feliĉeco estis iom kondiĉita: tiu insektaro religie opiniis ke ilian bonŝancon havi ĉiam la necesan manĝaĵon kaŭzis la skarlataj papavoj, kiuj abunde kreskiĝas ĉi tie.

- Tiaj diaj floroj estas la kialo de nia feliĉeco - diris la preĝanta manto - kaj ni ĉiusemajne devas montri nian dankecon al ili per nia nokta valso, se ni ĉesigus la kontinuecon de tiu sankta ceremonio, io malbonega povus trafi nin!

Tial, ĉiusemajne, ili eniris profundan kavernon, kiu, laŭ la manto, estas la plej taŭga ejo por celebri la solenan riton. Kaj verdire, la danco honore al papavoj kiun ili plenumis estis tre miriga kaj plaĉanta al vido. Alveninte al ĉi tiu punkto de la historio, oni rajtus demandi: kiel tiuj insektoj kapablis atingi sian ceremonejon ene de la kaverno, kie la plej densa mallumo regas, kaj cetere, dum la nokto? Bone ni ne forgesu, ke en tiu insektaro estis ankaŭ lampiro. Kaj ĉiuj scias ke lampiroj povas produkti lumeton. Dank' al tiu natura lumigilo ili komferte moviĝis tra la labirintoj de la kaverno, kaj cetere, danci en tiu krepuska atmosfero estis plej plaĉe.

Iu tago tamen, aĉa grupo da fi-vespoj alvenis. Dum la unuaj tagoj ili parolis al neni. Ili ĉiujn observadis de malproksime kaj mallaŭte babilis inter ili. Baldaŭ io malbona estis okazonta. Fakte, post unu monato da silento, la vesp-estro alvokis al si la insektojn kaj tiel komencis paroli:

- Miaj karaj gefratoj! Ĉu vi scias kiel nia amiko lampiro estigas la lumon, per kiu oni povas sin orienti en la tenebra kaverno? - Ĉiuj kapneis. - Bone, mi klarigos tion al vi: la lumo estas la konsekvenco de ĥemia procezo, kiu aktiviĝas ene de la korpo de la lampiro kiam ĝi troviĝas proksime al nia pikilo. Kial li diras tion al ni, vi eble demandus al vi mem, ĉu ne? Lasu min paroli! Ni vespoj sentas la devon sciigi al vi, ke morgaŭ ni foriros de ĉi tiu arbareto. Ni intencas transloĝiĝi al eksterlanda arbaro, kie nia vivo estos pli facila ol ĉi tie. Nun, vi komprenos, ke kiam ni estos for, sen niaj pikiloj en la ĉirkauaĵoj, tiu ĥemia procezo ne

plu okazos, kaj la lampiro ne plu produktos la lumon. Ni ne ŝatas la ideon ke vi troviĝu antaŭ tiu neatendita evento sen almenaŭ iel pretigi vin kaj agi kontraŭrimede. Tial mi avizis vin: tio, kion nun ni estas nur parole imagantaj, baldaŭ estos la realo.

- Sed, kion ni povas fari? - diris la manto timigite - tio, kion vi rakontas al ni estas terura! Se vi forirus, la lampiro ne plu povus lumigi la vojon tra la kaverno, tial ni ne plu povus fari nian religian ceremonion, nek ni povus elekti alian ejon! La rito devas esti farata ene de la kaverno! Do sekve, la papavoj ne plu protektus nin, kaj tial ni ne plu kapablos trovi la manĝaĵon! Ni ĉiuj mortos!

- Kial ne uzi fajron? Diris la vespo - per ĝi vi facile povus vidi en la mallumo.

- Ĉar ni timegas la fajron! - Respondis la papilio.

- Ni tre bedaŭras, karaj amikoj - malvere daŭrigis la vespo - sed la vivkondiĉoj ĉi tie multe malpliboniĝis lastatempe! Ni devas foriri!

La paniko tiam jam disvastiĝis inter la insektoj kaj tiuj lastaj vortoj de la vespo plifortigis tian malplezuranton: la limakoj ekploris, la papilio svenis plurfoje, la skaraboj tremis, kaj la milpiedulo ekkriis: - mi ne volas morti! -

- Nu, estus ia solvo - diris la estro de la vespoj, kiu jam antaŭvidis ĉion - sed..

- Bonvolu paroli - petis la manto - ni faros ĉion eblan por liberigi nin el tia morta danĝero.

La vespo silentis dum kelkaj sekundoj, kiuj ŝajnis senfinaj al ĉiuj. Tiam estis la adekvata momento por finfine riveli sian veran celon.

- Se vi laborus por ni, kaj helpus nin transiri la malfacilaĵojn vivi ĉi tie, eble ni povus resti

- Ni faros tion - diris la manto, kaj ĉiuj kunsentis kun ĝi. Tiel la sklaveco de la insektoj de la arbareto komenciĝis, sed ne subite, abrupte. Malrapide. La vespoj iom post iom iĝis pli kaj pli postulemaj: ili pretendis, ke la loĝantoj de la arbareto trovu la manĝaĵon kaj kuiru por ili, lavu iliajn vestojn, gladu, konstruu grandegan neston por ili, kaj tiel plu. La vespoj alivorte vivis parazite, nenifarante, profitante la laboron de tiuj simplanimaj, naivaj, bonkoraj insektoj. Sed la timego ke la vespoj foriru, frostigis la emon ribeli. Bonŝance, tiu maljusteco ne daŭris longe: iunokte, dum ili eniris la kavernon por la kutima ceremonio, kiroptero, kiu delonge observadis ilin senvidite, ekaperis el malhela angulo.

- Saluton! Mi nomiĝas Karmel. Karmel Mallia. Vi ne konas min sed vin mi konas. Via dancado ĉiam amuzis min, kaj mi scias ke vi havas multajn problemojn kun tiuj fivespaĉoj lastatempe! Mi volas helpi vin- li diris palpebrumante.

La kiropteroj, tio estas tre konata fakto, uzas

> 12



## Rakonto de Adil Olluri, el Albanujo

**A**mbaŭ ili, samtempe, eliris el siaj hejmoj, trovitaj tutapude unu al la alia. Ili iris la saman vojon. Unu kun la gitaro surbrake, ekiris piede je direkto al la urbocentro, dum la alia per tre luksa aŭtilo alveturis al la sama destino, ne vidante la gitariston, kiu, paŝon post paŝo, piedradis al sia celobjekto. Ankaŭ li ne estis vidinta lian rapidan aŭtilon. Eĉ se ili ekvidus unu la alian, apenaŭ kvarradulo impresigus al gitaristo, nek la sonoproduktilo kafkolora, kun kelkaj kordoj trameze de ĝi, al la aŭtilo.

Erĉmir, kiun la intimaj amikoj vokis Eri, kio plaĉis al li, estis la unua en sia muzikbando kaj cerbumadis ke li estis eĉ ja unu el la plej bonaj en la ĉefurbo, tute ignorante la similulojn de la sama metio. Ŝajnis ili al li malviglaj en la interpretado, senskrupulaj imitantoj, ĉar la titolon de la modernisto li estis rezervinta al si mem. Li estis laborante ĉi tagojn, horojn kaj momentetojn, por pretigi la unuan kanzonon, kiun hodiaŭ li donus la definitivan formon. Eri estis plene konvinkita. ke ĉi tiu rok-balado atentigus kaj mirakligus ĉiujn artamantojn de la bela sono. Li estis konvinkita ke, tiamaniere, li estis farante tion, kion rare aŭ tute la aliaj povus realigi. Li estis senhaltebla en sia laboro, kiun li amis tutanime, kaj, kiam li engaĝiĝis por fari ion, la laciĝo kaj la dormo tiutempe apenaŭ estis konataj por li.

Bujar gvidis konstruan entreprenon kaj sin konsideris unu el la plej potencaj homoj en tiu kampo, kio estis el la plej profitemaj en ĉi tiu lando. La homoj, ĉiamfoje kaj ĉiamloke, bezonis konstruaĵojn, eĉ se nenion alian, jen por hejmoj aŭ aliaj domoj, jen por pontoj aŭ palacoj aŭ ĉio alia kiu povus servi ilin. Kune kun la metio de la dentisto kaj barbiro, la profesio de konstruisto eniris en tiu triopo de la metioj kiuj ne lasis la homon iam ajn sen mono, tiel dum pacotempo kaj bonfarto, kiel dum milittempo kaj malprospero.

Nia aŭtisto ne estis homtipo kiu kontentiĝis nur per faritaj laboraĵoj aŭ per la enspezita mono dum la pasintaj jaroj. Li estis konstruinta kelkajn lernejn kaj hospitalajn domojn, grandajn domojn de la altrangulaj gvidantoj, tri ĉielskrapulojn po dek etaĝaj kaj multajn aliajn, malgrandajn kaj grandajn objektojn, kaj el tiuj laboraĵoj li estis enspezinta notindan monsumon, kio igis lin sin senti ege kontenta kaj ne interesiĝi pri io ajn. Sed, dum ĉi tiu jaro, ĉe li ekaperis signoj de malkontento kaj malkvietigo pro la sorto de lia entrepreno, ĉar, krom kelkaj malgrandaj konstruaĵoj,

hejmoj de ordinaraĵoj, li ne estis certiginte ion alian grandan labormendon, kio alportintus similajn profitojn, samkiel en la proksima pasinteco.

La gitaristo kaj sia bando, antaŭ la dekdua horo de la mateno, finis sian kanzonon kaj, plene je kvazaŭ infana ĝojo, survojiĝis al la radioteleviziaj stacioj enlandaj. Ili ekveturis impete, kvazaŭ alportus tien la plej valoran kazon, kion ili senpacience esperis aprezi kaj akceptati. Sed, en la du unuaj stacioj ili travivis unuan ignoriĝon, ĉar la tieaj redaktistoj apenaŭ konsentis akcepti ilin dum la rendezuo, respondante mallonge ke la diskedon ili lasu en la akceptejo, ĉar, laŭ ili, antaŭ la elsendo, tio devus bone estimati. Eri kaj liaj amikoj iom rompiĝis, sed ne haltis, ili daŭrigis la ekiritan vojon, estante konviktaj ke la unuaj stacioj estis ja du neseriozaj muziklanĉejoj kaj ili estas erarintaj negocii kun tiuj. Tamen, simila situacio trafis ilin ankaŭ en la ceteraj kazoj. La samaj reagoj, la samaj vortoj. La vortoj "akceptejo" kaj "profesia teamo", kiu sin okupas per analizo de la valoroj de la kanzono, fariĝis por ili jam nervozigaj, sed la plej grandan seniluziĝon ili ricevis de muzika redaktisto, kiun ili konsideris klera homo kaj grandgustulo, dirinta ke li neniel povus permesi tion, ĉar ili, en noktoklubo, estis kantintaj kanzonojn de fremda moderna kantisto, sin espriminta kontraŭ la memstareco de nia lando. Envane Eri estis klopodante klarigi ke la arto estas nur arto, sed li tute ne volis pludaŭrigi la interparolon. Tiu okazaĵo igis ilin ke, mallevkape, ne intersalutante bone unu kun la alia, ekiru al siaj hejmoj.

Bujar, hodiaŭ, dum antaŭtagmezaj horoj, kafumis kun unu el la plej gravaj homoj, pri kiu la civitanoj diradis ke estis la dekstra mano de la ĉefgravulo, aparte kiam temis pri disdonado de la labormendoj, enspezantaj profitojn. Tiu grava homo estis klare eksplicinta al la konata konstruisto kial li ne povis akcepti tiaĵojn ekde jaro kaj ne akceptus ankoraŭ dum longa tempo, ĉar estis ja li mem kiu estis konstruinta la belajn domojn por la antaŭaj gvidantoj, kiuj dekdu monatoj antaŭe, estis draste falintaj de la ŝtatpotenco. Tio estis koleriginta la nuntempajn tronulojn, kiuj ne plu volis okulvidi, nek aŭdi pri li. Bujar, envane estis klopodinta ekspliki al la gravulo ke li faris nur la laboron por kio li estis pagata kaj ne subtenis iun partion. La gravulo eĉ ne volis pluaŭskulti, mallonge redirante ke la kolero de la grandulo povas mildiĝi nur servante lin. Sed tio estis lezinta sian orgojlon, igante lin humile eliri de tiu kafejo, por eniri en alian, servanta



DUA PARTO - LA VIVO



Rimarko de Anniespera

54

**Tio, kio estas bone plantita, ne estos elŝirita.**

**Tio, kio bone estas firmitenata, ne forglitos.**

**Tiu, kiu postlasas sian memoron al filoj kaj nepoj, ne ĉesas ekzisti.**

**Tiu, kiu formas sian personon, ties vivo fariĝas vera.**

**Tiu, kiu formas sian familion, ties vivo fariĝas plena.**

**Tiu, kiu formas sian komunumon, ties vivo kreskos.**

**Tiu, kiu formas sian landon, ties vivo fariĝas riĉa.**

**Tiu, kiu formas la mondon, ties vivo fariĝas vasta.**

**Tial: Laŭ via persono prijuĝu personon de alia.**

**Laŭ via familio juĝu familion de aliaj.**

**Laŭ via komunumo prijuĝu komunumon de aliaj.**

**Laŭ via lando prijuĝu landon de aliaj.**

**Laŭ via mondo prijuĝu mondon de aliaj.**

**Kiel mi scias la staton de l' mondo?**

**Ĝuste per la supre dirita.**

La vorto „plantita“ eble ne estas taŭga, en la originalo la vorto „jian“ (fonetike) kredeble signifas „starigo“.

Simila estas „elŝirita“: en la originalo la vorto „ba“ (fonetike) havas multajn sencojn, „elŝirita“ ja estas unu el ili, sed ĉi tie ĝia senco plejble estas „ŝanceliĝi“.

Vd. de Wang Chongfang:

„Tiu, kiu estas lerta en starigo, ne ŝanceliĝas;  
„Tio, kio bone estas firmitenata, ne forglitos.“

Laŭ la originalo, en via esprimo, la subjekto kaj objekto mislokiĝis unu al la alia. Simila ankaŭ la unua frazo.


Vd. de Wang Chongfang:

„Tiu, kiu estas lerta en tenado, perdas nenion.  
Tiu, kiu formas sian personon, ties vivo fariĝas vera.  
Tiu, kiu formas sian familion, ties vivo fariĝas plena.  
Tiu, kiu formas sian komunumon, ties vivo kreskos.  
Tiu, kiu formas sian landon, ties vivo fariĝas riĉa.  
Tiu, kiu formas la mondon, ties vivo fariĝas vasta.“

En la supraj kvin frazoj ekzistas du problemoj komunaj: Pri „formas“: en la originalo la vorto „xiu“ (fonetike) ĉi tie signifas „praktiki“ anstataŭ „formas“, kaj ĝia objekto estas „zhi“ (fonetike), kiu signifas „ĝi.“

(daŭrigota)

Ŝercoj



- Sinjoro doktoro, mi ne scias, kion fari, miaj piedoj ĉiutage pli kaj pli nigriĝas! Ĉu mi baldaŭ mortos?!

- Ĉu vi lavas viajn piedojn?  
\* \* \*

Monpuno estas imposto pro la neleĝaj faroj.

Imposto estas monpuno pro la leĝa faroj.  
\* \* \*

Edzo revenas frustanta hejmen. Sidas ĉe la tablo, manĝas, ne parolas kun sia edzino. Ŝi ne scias kiel komuniki al li la bonan novaĵon, fine, ŝi decidas kaj diras:

- Kara, mi estas graveda!

Edzo ĵetas la kuleron:

- Ĉu vi ankaŭ?!!  
\* \* \*

En lernejo la instruistino diras al la gelernantoj:

— Diru al mi kvin bestojn, kiuj vivas en la Norda arkto!

Peĉjo anoncas sin:

— Unu foko kaj kvar blankaj ursoj.





**HORIZONTALAJ DIFINOJ ( → )**

1. Blua spaco super nia kapo (akuzativo); 6. Scienco havas \_\_\_ enuan, sed frukton bonĝuan; 11. Metis ordon; 12. Ne estigi certa; 13. \_\_\_ sinjoro (komence de letero); 14. Simila al brila blanka globo; 15. Frakcio kun numeratoro egala al unu; 16. Senti bezonon trinki; 17. Lingva kodo de Esperanto; 18. Difina artikolo; 19. Don Giovanni estas \_\_\_ de Mozarto; 20. Tut-Tera Teksaĵo; 21. Dividiĝas nur per si kaj per 1; 22. Klopodi, streĉi; 23. Pasinta \_\_\_ for el memoro; 25. Metodo de pago (akuzativo); 26. La ĉefa dio en la ĝermana mitologio; 27. La ekstera parto de la suna atmosfero.

|    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |    |
|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|----|
| 1  | 2  | 3  | 4  | 5  |    | 6  | 7  | 8  | 9  | 10 |
| 11 |    |    |    |    |    | 12 |    |    |    |    |
| 13 |    |    |    |    | 14 |    |    |    |    |    |
| 15 |    |    |    | 16 |    |    |    |    | 17 |    |
| 18 |    |    | 19 |    |    |    |    | 20 |    |    |
|    |    | 21 |    |    |    |    | 22 |    |    |    |
| 23 | 24 |    |    |    |    | 25 |    |    |    |    |
| 26 |    |    |    |    |    | 27 |    |    |    |    |

**VERTIKALAJ DIFINOJ ( ↓ )**

1. Dolĉa manĝaĵo farita el kakao; 2. Rilata al Persujo; 3. Faco de solido; 4. Mia, via, \_\_\_; 5. Simbolo por osmio je kemio; 6. Ŝaŭmo kaj tumulto de marondoj; 7. Esti ebla; 8. \_\_\_, via, lia; 9. Komence duono de ogro; 10. Venena alkaloido, ekstraktata el tabako; 12. Alveno (kontraŭo); 14. Versa verko; 16. \_\_\_metro estas aparato, per kiu oni mezuras la aervolumenon; 17. Homgrupo konscia pri siaj diferencoj (akuzativo); 19. Havas simbolon Au (akuzativo); 20. Apo \_\_\_ = farmacio; 21.

\_\_\_-malpli = ĉirkaŭ; 22. Prepozicio montranta instrumenton, materion aŭ objekton; 24. Komence duono de odro; 25. Komence sillabo de ĉokolado.

*(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en la lasta paĝo)*

Fonto: Semajno de Enigmoj #2 <http://www.semajnodeenigmoj.com>

**Senĝardenaj apartamentaroj**

verkis Marcel Leereveld, el Aŭstralio

**AŬSTRALIAJ LOĜEJOJ**

**A**ntaŭ cent jaroj la loĝejoj en aŭstraliaj urboj, escepte de la centra butikaro, estis kutime memstaraj unuetaĝaj domoj kun malgranda ĝardeno. Ofte troviĝis ĝardeno antaŭ kaj ĝardeno malantaŭ la domo, de diversaj grandoj.

Poste oni ofte konstruis malgrandajn kaj grandajn apartamentarojn. Kelkaj el ĉi lastaj eĉ ne havas ĝardenon ĉirkaŭ si, precipe en la urbcentro.

En eŭropaj urboj, antaŭ cent jaroj kaj nun, oni trovas preskaŭ nur apartamentarojn. Ili kutime estas kvadrataj, sen antaŭaj ĝardenoj, sed kun malgrandaj ĝardenoj en la enfermita centro de la domaro. Tiuj apartenas nur al la loĝantoj de la unua etaĝo, la t.n. teretaĝo. Notu ke la eŭropanoj erare nomas la duan etaĝon la unua etaĝo. Plej ofte, kaj kutime devige, ekzistas nur kvar etaĝoj, kvankam nuntempe oni konstruas ĝisdekkvinetaĝajn apartamentarojn, sed precipe ekster la urbcentroj, ĉar la eŭropanoj amas, kontraŭe al la aŭstralianoj, siajn malnovajn domojn kaj ne detruas ilin, kiel kaj kiom faras la aŭstralianoj, vandale. Pro la altaj kaj densaj apartamentaroj nunaj oni bezonas detruiri malpli da eksterurba arbaro aŭ

brutejoj.

En la kvadrataj domblokoj oni kutime havas balkonon en la malantaŭo de la apartamento. Ĝi precipe celas sekigi lavaĵojn. Sed en Aŭstralio tiaj balkonoj ofte troviĝas ĉe la antaŭo de la apartamento, kaj tiuj celas precipe sidi en la suno.

La tipe aŭstralia antaŭurbo havas milojn da apartaj domoj kun sia ĝardeno, la lasta nuntempe tre malgranda por malaltigi la prezon.

La eŭropa ĝardeno ĉe apartaj domoj, ja nur ekster la urboj, estis ĉiam tre aŭ eĉ ege malgranda. Ĝi servas nur por sidi ekstere en la suno kaj meti la rubujon.

En eŭropaj landoj antaŭ cent jaroj la kutima altecnivelo estis kvar etaĝoj, ne pli. En Nederlando la unua pli alta domaro, kaj pro tio fama tiutempe, konstruatis ĵus antaŭ la dua mondmilito, do antaŭ okdek jaroj.

Post la 1940-45a milito oni komencis konstrui altajn "ĉielskrapulojn", sed ne en la centroj de la urboj, ĉar la eŭropanoj tre amas siajn urbojn. En Aŭstralio okazas la kontraŭo: la altegajn konstruaĵojn oni konstruas prefere en la centro de la urboj, detruante la malnovajn konstruaĵojn, vandale. Nuntempe ekzemple



>>>



## Mallonga Historio de Filozofio (36)



### Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

### Hannah Arendt (1906–1975)

#### La viro kiu ne faris demandojn

**A**dolf Eichmann estis tre laborema nazio. Ekde 1942 la judoj estis sendataj al koncentrejoj en Pollando, inkluzive de Auschwitcz kiu estis eble la plej terura koncentrejo. Tio estis la plano de Adolf Hitler por “purigi” la landon de la judoj, do la nazioj efektiviĝis sisteman planon. Por la efektiviĝo de tiu plano la fervojo devus funkcii regule kaj Eichmann estis respondeca pri tiu afero. Kvankam Eichmann faris fizike nenion kontraŭ judoj li estis parto de tiu politiko kiu ĉiutage mortigis milojn da judoj en iu alia parto de la lando. Pro lia laboremo funkciigi la fervojon regule kaj sukcese ie alie en la lando oni mortigis homojn. Li mortigis neniun kaj malhelpis al neniuj judoj, sed li estis parto de tiu sistema politiko. Li estis homo tre laborema, kiu provis fari sian laboron sukcese.



En la fino de la Dua Mond Milito li sukcesis eskapi el la manoj de Aliancoj kaj forfuĝis al Argentino. Sed Mossad la juda sekreta servo sekvis lin kaj en la jaro 1960 malkovris lian kaŝlokon en Buenos Aires, la ĉefurbo de Argentino. Mossad sekvis, kaptis, anestezis lin kaj kaŝe transportis lin al Israelo por esti juĝota kaj punota. Ĉiuj pensis, ke li estis iu alia nazia monstro sed ĉio kion li faris estis nur fari sian laboron perfekte en la tiama Germanio. Tamen lia laboro estis helpanta al la nazioj efektiviĝi la kontraŭjudan politikon. Ĉu li devus forlasi sian laboron? Eichmann ŝajnis tute ne maltrankvila pro la akuzoj kaj lin defendis dirante ke li faris neniun damaĝon al judoj. Ĉion kion li faris estis labori fidele al sia tasko.

**Hannah Arendt** estis germana judino, kiu poste forfuĝis el la nazia Germanio. Ŝi naskiĝis en Hanovero en familio kiu suportis la social-demokratojn. Ŝi studis

en Marburg universitato kaj havis amaferon kun sia instruisto filozofo Martin Heidegger kvankam li estis edziĝinta. Oni taksas lin homo kiu kontribuis multon al la tiama filozofio kaj multaj filozofoj estis influitaj de liaj verkoj, sed aliaj pensas ke li intence uzis tre malfacilan lingvon en siaj verkoj, ekzemple en la nekomprenebla libro “Esto kaj Tempo” kiu aperis en la jaro 1927. Li poste fariĝis ano de la Nazia Partio kaj fariĝis apoganto de la kontraŭjuda politiko, li ankaŭ helpis naziigi la universitaton de Freiburg. Post li fariĝis apoganto de nazioj, li forigis judajn nomojn el siaj verkoj ekzemple la nomon de filozofo Edmund Husserl.

Politika filozofo Hannah Arendt en la 1960’aj jaroj estis korespondanto de revuo New Yorker, kiu sekvis la juĝon de Eichmann en Jerusalemo. Por ŝi Eichmann estis homo kiu ne pensante profunde rilate al sia laboro, lia laboremo, eble nerekte, rezultis al teruraj okazaĵoj kontraŭ la judoj en la nazia Germanio. Laŭ Arendt, Eichmann ne estis nazia monstro tiel, kiel la aliaj nazioj. Li estis nur konfida al sia laboro en la tiama raciista Germanio. Multaj pensas ke li estis maljusta. Sed kiam Eichmann defendis sin dirante ke li nur provis fari sian laboron, Arendt kredis je tio. Kontraŭ aliaj nazioj li tute ne posedis malamon kontraŭ la judoj. Li tute ne mortbatus judon en la mezo de la strato pro ke tiu judo ne salutis Hitleron. Tamen li akceptis la nazian idelogion kaj laboris en la tiama ŝtato por perfektigi la fervojon, kiu fakte ankaŭ helpis al la nazioj efektiviĝi siajn kontraŭjudan politikon. Li ne havis la kuraĝon pridemandi la ordonojn donitaj al li. Arendt priskribas lin kiel malprofunda kaj sencerba homo. Povus esti ke li mensogis al la juĝejoj, tamen ĉu li estus monstro, tio estus facile malkovrebla ĉar monstroj estas maloftaj. Se li ne vivus kaj laborus en la nazia Germanio li eble estus tre bona homo. La etoso en la tiama Germanio estis kontraŭ tia homo, tamen tio ne malkulpigas lin. Li obeis malmoralajn ordonojn. Por Arendt obei al tiaj ordonoj estis la samo helpi kaj efektiviĝi la nazian politikon. En ŝia libro “Eichmann antaŭ Jerusalemo” ŝi diras, ke Eichmann en la juĝejoj kondukis laŭ la moralalo pri tasko de Immanuel Kant (vd TS #20 kaj #21) sed li tute fuŝis kompreni Kant’on pri la devo kondukti morale kaj digne kontraŭ aliaj homoj.

(daŭrigota)

>>>

en Melburno oni povas vidi la sunon nur se oni grimpas dekojn da etaĝoj.

Mi demandas min, ĉu ne pli belus konstrui la domojn profunden en la teron, kaj tiel uzi senpagan varmegon de la interno de nia tero (Legu anstataŭe:

“de la tero kiu tuta apartenas al la grandaj internaciaj kompanioj”).

verkis **Marcel Leereveld**, el Aŭstralio

Fonto: **Aŭstralia Esperantito** AE #400

Ĉi tiu estas fabelo de ĵemajtaj fabeloj tradukita el litova lingvo al Esperanto per samideano Antanas VAITKEVIČIUS, emerita instruisto de angla lingvo. Li loĝas en Alsėdžiai, distrikto de Plungė. Li esperantistiĝis preskaŭ antaŭ 50 jaroj dum studado en Vilnusa universitato (1966-1971). Li verkis versojn en Esperanto, partoprenadis konkursojn "Muzo". Ĝuu la tradukaĵon.

sendis **Povilas Jegorovas**  
el Litovio

-- oOo --

am vivis vilaĝano. Li havis tri filojn, belajn kaj kuraĝajn fraŭlojn, sed pro sia persona fiero la du fratoj traktis la plej junan kiel stultulo.

Kiam la filoj transdudekjarigiĝis, ekdeziris ili vojaĝi por ekkoni kiel homoj vivas. La pliaĝuloj diras:

- Iru ni duope, pro kio ĉi-tiu stultulo devas ĝeni al ni. Li nur klopodojn kaŭzos.

Sed la patro ne konsentas. Iru ankaŭ la plej juna por sperti homan vivon.

Do, ekveturis ĉiuj tri, sabrojn alflankiĝinte, sakojn surdorsiĝinte.

Vojaĝis ili tra vilaĝoj ĝis kiam atingis ili grandan arbaron. Enpaŝis ili ĝin per vasta vojo, sed ju daŭre ili iris, des pli la vojeto malvastiĝis, kaj finfine ĝi malaperis entute. Post nelonga plua irado ili tute malorientiĝis kaj ne sciis, kien iri. Tiam ili ekbruligis fajron kaj pretiĝis por dormi. La plej aĝa frato prenis sian sabron kaj restis por gardi:

- La unuan nokton mi gardos vin de malamikoj kaj arbaraj bestoj. Dormu pacience.

Ambaŭ fratoj ekdormis. La plejaĝulo zorgis pri la fajro kaj la dormo de siaj fratoj. Kiam meznoktiĝis, subite eksusuris arbustoj kaj antaŭ li aperis urso.

- Junulo, - li diras- eble vi regalos min per vespermanĝo?

Sed la plejaĝulo eksvingis la sabron kaj forhakis la ursan piedon. Ekgrumbliis la urso pro doloro kaj kolero. Ĵetis sin en la arbuston kaj malaperis el la frataj okuloj.

Matene li fanfaronis al siaj fratoj, ke li estas savinta ilin el la ungegoj de la furioziĝinta urso. Liadire ĝi ĵetis sin al la ambaŭ dormintoj kaj nur li sola sukcesis konkeri la ursan. Por pruvi la verecon de siaj vortoj li montris la ursan piedon.

Sekvontnokte gardostaras la mezaĝa filo. Meznokte antaŭ li ankaŭ aperas urso petanta vespermanĝon, sed ankaŭ la mezaĝulo forhakas lian

piedon. La besto hurlanta pro doloro malaperas.

Trianokte ekgardas la plejjunulo. Promenadas li, metadas vergojn en la fajron kaj gapas al la steloj, lumantaj tra la arbofolioj. meznokte tra la arbustoj penetriĝas grandega urso.

- Aŭskultu, junulo, - ĝi diras, - eble vi regalos min per vespermanĝo? Mi vere malsategas.

- Kial ne, urseto? - respondis la junulo. - Bonvenon al ĉio, kio restis post nia vespermanĝo.

Kaj li regalas la ursan per la postrestaĵoj de la vespermanĝo.

La urso ekmanĝis, satiĝis kaj ekparolis:

- Mi vidas, ke vi malsimilas al viaj fratoj. Mi volas rekompenci por via bona koro, kaj helpemo al ĉiu estaĵo. Iru nun tiadirekte kaj vi trovos la domaĉon de arbaraj rabistoj. Tie vi ilin ne timu kaj iru ĉien, kien ili vin invitos. Kaj en ĉiu loko, kiun vi trafos, konduku laŭ la voko de via bona koro. Mi konas, ke vi sukcesos distingi inter la bono kaj malbono. Kiam vi estos ĉion plenuminta kaj ekkonos kio estas plu farenda, voku min per mia nomo kaj mi tuj aperos.

Post tiaj vortoj, ĝi turnis sin al la arbustaro kaj malaperis el la junulaj okuloj. Iomete pensinte li iris al la direkto indikita al li de la urso.

Post ioma tempo li ekvidis malgrandan lumeton brilantan tra la arbofolioj, kaj baldaŭ li atingis la dometon kie loĝis murdistoj. Ekvidinte la plej junan fraton, ili kaptis siajn glavojn kaj ĉirkaŭis lin.

- Kiel vi sukcesis trovi nin? - demandis ili. - Nun vi devos ekrabi kune kun ni, aliel ni tuj forkapigos vin.

- Kial ne? - respondis la junulo. - Vi povas konduki min kune kaj mi faros ĉion, kion vi volas.

La rabistoj esploris la junulon kaj diris:

- Vi estas maldika kaj svelta, do vi sukcesos tra eta truo ŝovi sin en la sinjoran kastelon, kaj ni tion ne kapablas. Ni iru kune kaj vi devos helpi al ni murdi la sinjoron kaj forpreni lian oron ankaŭ filinon. Se vi rifuzos, viva vi ne postrestos. La junulo garantiis, ke li obeos ĉiujn iliajn ordonojn kaj ili ĉiuj ekiris al la sinjora kastelo. Atinginte ĝin, la murdistestro ordonis la junulon enŝovi sin tra eta truo, inspekti ĉion bonege kaj poste malferminte fenestron ekkrii, ke la vojo kastelen estas senobstakla ankaŭ por ili.

- Nur atentu, - diris la estro, - kiam vi estos jam interne, ĉe la pordo vi trafos sidantan grandegan gufon. Senprokraste dekapigu ĝin, ĉar kontraŭe ĝi ekkrios per terura voĉo kaj vekos la gardistojn. Ni provis kelkfoje, sed ĉiam ĝi kaŭzadis bruegon, pro kiu ni malsukcesadis prirabi la kastelon.

La junulo tra groto rampis en la korton kaj ĉe la pordo ekvidis sidantan grandan gufon, kiu

ĉirkaŭturnadis siajn grandegajn okulojn, vige esplorante la ĉirkaŭaĵon. Tamen la kompatema junulo ne povis ĝin murdi, kaptis la gufon kaj kaŝis ĝin sub sia jako. Pluirante, li multloke trovis gardistojn, sed ĉiuj estis en profunda dormo, ĉar pro la gufa pereonenui povis ilin vekti.

Finfine li atingis la sinjoran dormoĉambron, kie en lito ĉe brulanta kandelo dormis la kastelposedanto. Ĉie brilis oro kaj diamantoj. Ankaŭ ĉi-tie la gardistaro tiel intense dormis, ke neniu vekigis pro liaj paŝoj. Esplorinte la ĉambron, la junulo pensis, ke li ne povas permesi la rabistoj forrabi la sinjoran oron kaj murdi lin.

Tiam li daŭris iradon. Li atingis la dormoĉambron de la sinjora filino kaj ekvidis dormantan knabinon. Ekvidinte ŝin, li vere konsterniĝis pro ŝia beleco. Li iris al ŝi, kisis ŝiajn lipojn, forprenis diamantringon de ŝia fingro kaj enpoŝigis ĝin. Nun li jam firme konis, kio estas farenda. Li tuj venis al la fenestro, invitante la rabistojn. Dum iliunu post la alia ŝovis sin internen, la junulo ĉiujn dekapigis. Poste li forprenis po unu sprono de ĉiu, elsaltis tra la fenestro, samtempe forlasante la gufon el sub la jako.

- Mi rekompencos pro via kompatato, - diris la birdo kaj residiĝis en sian kutiman lokon.

La junulo deziris ir al siaj fratoj, tamen ne povis trovi la vojon tra la arbaro. Tuj aperis la urso kaj portis lin al la noktejo, tamen la fratoj jam ne troviĝis tie. Ne atendante la plejjunulon, ili estis veturintaj for.

Ekveturis la plejjunulo tra la mondo, tamen neniel li povis forgesi la belulinon, sinjoran filinon. Do, li decidis reviziti la palacon kaj ekvidi kiel ŝi vivas. Sed ne scias li kiadirekte iri, kie la knabinon serĉi. Atendinte la nokton, li turnis sin al la luno kaj vokis la gufon.

Ekbruis la arbaro, kaj la gufo jam estas ĉe li.

- Kion vi bezonas, bofaranto? – demandis li.

- Mi deziras reviziti la sinjoran kastelon, kaj ekvidi, kion faras lia filino-belulino.

- Nu, se tia estas via deziro, bonvolu urĝi. La sinjoro intencas fari sian filinon edzino de la palacestro, kiu fieras pri murdado de la rabistoj. Pro tio, ke neniu vidis, ĉiu kredas tion. Nur unusola sinjoridino tion ne kredas, asertante, ke rabistoj estis murditaj per afabla junulo, kiun ŝi vidis en sia sonĝo. Sed la sinjoro malatentas ŝiajn vortojn, kaj intencas jam morgaŭ aranĝi la nuptofeston.

- Montru la vojon! – ekkriis la junulo.

- Bone, - konsentis la birdo, - mi povas montri la vojon, sed estas cent verstoj de ĉi-tie ĝis la sinjora kastelo kaj ĝis kiam ni atingos ĝin, multaj tagoj forkuros. Kaj la nupto estas jam morgaŭ.

Tiam la junulo memoris sian amikon urson kaj

vokis ĝin por helpi lin. Kvazaŭ per unu salto ĝi ekstaris antaŭ li.

- Ursĉjo, portu min al la sinjora kastelo. Kaj urĝu por morgaŭ atingi ĝin.

La urso sidigis lin sur sian nukon kaj ekvojaĝis. Ĝi kuris tiel, ke eĉ vento siblis kaj la gufo direktis ĝin flugante antaŭe.

Kiam la kastelo estis atingita, la amuzado jam estis ardega. Ĉetable sidis la fianĉo, proklaminte sin estro de la kastelo kaj savinto de la sinjoro kaj lia filino. Ekvidinte la junulon, la knabino stariĝis kaj kriante " Jen estas mia vera savinto", kuregis al la junulo. Ĉiuj estis ege surpriziĝintaj ekvidinte novan savinton, kiam unu savinto jam sidis ĉe la fianĉino.

- Jes, vere mi savis la sinjoron kajlian filinon de murdistoj, - diris la plej juna frato.

- Li mensogas! – ekkriis la falsa fianĉo. – Ĵetu lin for el la palaco.

Tamen la sinjoro gestis permane por ke ĉiuj silentu kaj ekdemandadis:

- Diru, junulo, kiel vi povas pruvi la verecon de siaj vortoj.

- Tre simple, - respondis la junulo. – Vi nur respondu, kial la rabistoj posedis nur po unu spronon.

Ĉiuj silentiĝis, nekonante la respondon. Tiam la junulo elpoŝigis la mankantajn spronojn kaj montris ilin. La sinjoro kaj aliaj gastoj ekvidis, ke ili estis la rabistaj spronoj. Tiam la junulo prenis la oran ringon kun diamanto kaj metis ĝin sur la princina fingro kaj ĝi tute konvenis.

- Kaj kies estas ĉi-tiu ringo? – demandis la junulo.

- Ĉi ringo estas mia, - respondis la reĝidino, kiun vi defingrigis tiunokte, kiam vi defendis la kastelon kontraŭ rabistoj. Mi vidis vin ne en mia sonĝo, sed reale, kaj vi kisis min.

- Jes, - konfirmis li.

La sinjoro senprokraste forpelis la falsulon el la kastelo kaj admonis lin plu ne aperi, kaj la plej juna frato edziĝis al la plej bela filino de la sinjoro. Kiam ili vizitis la gepatrojn de la junulo, ili trovis revenintajn ambaŭ pli aĝajn fratojn. Ili estis mensogintaj, ke la plejjunulo pro sia stulteco estis mortigita de urso aŭ iaj aliaj sovaĝbestoj.

La gepatroj, aŭdinte pri la feliĉo de la plej juna filo, ege ĝojis, kaj liaj fratoj jam hontiĝis nomi lin stultulo, estis pli taŭge por la plejjunulo tiel nomi siajn fratojn, tamen tia penso ne trafis lian kapon.



**L**i estis sufiĉe alloga, kvankam jam delonge ne juna viro. Malrapidaj, iom pigraj movoj, facileta frapetado per fingroj sur la tablo, tutnova, gladita kostumo - ĉio atestis, ke li ne kutimis tumulto, sed kutimis, ke ĉiuj tumultas ĉirkaŭ li kaj kompleksas lin. Kaj li mem ŝajne ŝatis komplezi sin. Li sidis enpenŝiĝinte kaj krucinte la kruojn. Nina plurfoje timeme rigardis la viron de sia sidloko. Poste ŝi ne povos rememori, por kio li venis al ilia vestoriparejo, eble por refaldi pantalonon, aŭ eble ne. Sed ĉi tio ne gravis, estis nur grava, ke li tamen estis tie, kaj simple atendi sur sia seĝo ne sufiĉis por li, do li decidis ekparoli. Kaj li ekparolis al Nina.



Ĥristina Kozlovskaja

- Bona vetero estas hodiaŭ, ĝi, laŭ mi, estas la unua vere varma tago printempe.

Komence Nina ne intencis respondi, ĉar ŝi simple ne komprenis, ke tiuj vortoj estis adresitaj al ŝi. Sed post kelkaj sekundoj de profunda silento ŝi tamen levis siajn okulojn de kudrado kaj ĉirkaŭrigardis la ĉambron. Kial neniu respondas al li? - pensis la virino, serĉante per la okuloj siajn kolegininojn. Ŝi tre esperis ekvidi tie almenaŭ iun alian krom ŝi mem kaj tiu sinjoro, kiu ial rigardis ŝin. Kaj kiam Nina rimarkis, ke ili estas en la kudrejo solaj, ŝin kaptis ia stranga ekscitiĝo. Ŝi sentis, kiel sango ĵetiĝis en ŝian vizaĝon kaj manoj ekŝvitis. Ŝi tiom profundiĝis en siajn pensojn, ke ŝi simple ne rimarkis, ke du kudristinoj, kiuj hodiaŭ laboris kun ŝi, ien eliris. Ŝi tre deziris nun, ke ili revenu baldaŭ. Sed tiujn du, bedaŭrinde, kvazaŭ la tero englutis. Kaj kvankam la viro sidis ne apud ŝi, sed ĉe la najbara tablo, tamen Nina flaris la odoron de lia parfumo kaj maltrankviliĝis pro tio eĉ pli. Ŝi simple ne havis alian eliron.

Ŝi rigardis lin, ne havante eĉ plej etan ideon, kion ŝi povus respondi al li. Jes, la vetero estas bona, la tago estas vere varma, do kio? Nina neniam komprenis, kiel oni povas paroli pri la vetero. Ŝi ne apartenis al tiuj, kiuj parolas por ne silenti. Ne, ŝi ne estis iu homevitulino, ŝi simple ŝatis paroli, kiam tio vere necesis. Sincerdire, Nina ne sciis lerte komunikiĝi kun tiaj sinjoroj en belaj kostumoj, kun tiaj flegitaj, jam grizetaj barboj. Nina ĝis nun nenion respondis. Ŝi jam

ekpensis, ke ĉio eble iel pasos. Sed la sinjoro ne intencis lasi ŝin en paco.

- Vi estas bonŝanca, ke vi sidas ĉe la fenestro, el ĝi, verŝajne, malfermiĝas belega vidaĵo sur la straton.

La viro ridetis al Nina, ŝi siavice kapjesis, sentante, kiel flamas ŝiaj vangoj.

- Ĉu vi scias, sinjorino ... - li rigardis demande el sub siaj okulvitrotoj al Nina, kaj tiam ŝi jam ne konfuziĝis.

- Nina - ŝi diris per apenaŭ aŭdebla voĉo.

- Do, sinjorino Nina, ĉu vi scias, ke nome tiu strato, jen tiu, kiu estas ekster via fenestro kaj en kiu vi havas feliĉon labori, estas unu el la plej malnovaj stratoj de nia urbo? - li sidis flanke al la tablo, sin apoginte al la dorso de malnova seĝo. Lia maldekstra mano estis en la poŝo, kaj la dekstra ludis kun liniilo, kiu antaŭ tiu momento kuŝis sur la tablo.

- Mi ne sciis - ŝi kapneis, daŭrigante sian laboron.

Li ŝajnas esti iu profesoro, pensis Nina. Ŝi ne sciis certe, sed ĝuste tia devis esti en ŝia imago vera profesoro aŭ doktoro pri sciencoj, aŭ iu ajn el tiuj doktaj respektataj viroj.



Akwarelo de Natalia Pendjur

- Iam ĉi tie troviĝis la unua poŝtejo, la unua teatro. Ho, se vi nur scius, kiom grava estis tiam teatro por la urbanoj! Vespere homoj kunvenis ĉi tien el ĉiuj partoj de la urbo, - lia voĉo tre sonoritis en tiu granda kaj duonmalplena ĉambro. Ĝi eĥiĝis de la nudaj muroj kaj plenigis per si la tutan spacon. La viro svingis la liniilon kiel dirigento bastonon, kaj nun al Nina ŝajnis, ke tiu sinjoro tute ne estas profesoro, sed plej verŝajne aktoro, konata teatra aktoro. Kaj ju pli atente li rigardis Nina-n, des pli ofte ŝajnis al ŝi, ke io perturbas ŝin. Ŝi senĉese ordigadis sian ruĝan lanugan hararon, kiu konstante elpingliĝis, tiradis malsupren la manikojn, kiuj ĉiam sur ĉiuj vestoj estis tro mallongaj por ŝiaj

longaj maldikaj brakoj.

- Kaj al vi, sinjorino Nina, kiu arto plaĉas pleje? - liaj okuloj brilis, sed eble al Nina nur ŝajnis tiel, sed fakte brilis liaj okulvitroj?

La virino respondis la veron, ne detirante siajn okulojn de la kudromaŝino:

- Mi ne scias - Nina hontis pro ŝia respondo.

Antaŭe ŝi neniam ĝenus sin pro tiaj bagateloj, sed ial nun ŝi ŝatus diri ion pli saĝan.

- A-ha-hah, - la viro ekridis - vi pravas, sinjorino Nina, ni forgesu pri arto. Diru al mi prefere ion alian? Nu ... ekzemple, kiun okupon vi ŝatas hejme, en via libertempo?

Al tiu demando Nina jam konis la respondon, sendube Floro estas ŝia ŝatokupo.

- Hejme mi prizorgas mian katinon.

- Ho, kiel ĉarme tio estas ..., viro denove ridetis, al Nina eĉ ŝajnis, ke ŝi aŭdis iun maliceton en lia voĉo. - Kaj kiel ĝi nomiĝas?

- Floro.

- Vi scias, iam mi faris unu esploron pri tiu temo kaj klarigis, ke virinoj de via aĝo estas la plej emaj al korinklino al bestoj.

Tio embarasis iomete Nina-n, ŝi eĉ opiniis, ke ŝi vane ekparolis pri tiu temo.

- Mi simple amas mian Floron, kaj ŝi amas min.

La viro lasis la liniilon kaj nun atente rigardis Nina-n.

- Mia karulino, mi bedaŭras disrevigi vin, sed mi devas fari tion. La afero konsistas en tio, ke katoj kaj bestoj ĝenerale ne scipovas ami. Ili ne estas kulpaj pri tio, simple tia estas ilia naturo.

Nina ankaŭ lasis sian laboron kaj turnis sin al la viro. Kiel li povis tiel rapide trovi ŝian plej tiklan punkton? Nina iĝis malgajhumora, ŝin absolute indignigis liaj lastaj vortoj. Nina komencis defendi sin, ĉar la nekonato atencis ion tre valoran por ŝi.

- Kiel vi povas koni la naturon ĝuste de mia Floro? Vi ne scias, pri kio vi diras!

- Ĉio estas tre simpla, ĉiuj katinoj estas la samaj.

- Ne, ne estas la samaj. Se vi vidus, kiel ĝi renkontas min de laboro, kiel karese alpremiĝas al mi, kiam al mi estas malbone, vi ne dirus tiel. Mia Floro amas min, kiel neniu alia.

- Sinjorino Nina, mi havas akademian titolon en psikologio, do kreu min, mi scias, pri kio mi parolas. Bestoj ne povas ami, ĉe ili forestas memkonscio. Memkonscio estas termino indikanta operacion, per kiu homo perceptas sin. Dank' al ĝi homo ne nur komprenas la eventojn, kiuj okazas al li aŭ ŝi, kiel tion faras aliaj vivantaj estaĵoj, sed ankaŭ povas analizi ilin. Kiam homo amas, li aŭ ŝi konscias tion.

- Sed ĉu mia katinjo kondukis tiel, se ĝi ne amas min? Kiel do oni povas klarigi tion? - Nina ankoraŭ insistis, kvankam ŝia voĉo ne plu estis tiel certa.

- Bestoj posedas konojn de refleksa naturo, sed ili eĉ ne konscias tiun konon. Ili ne havas amon kiel tia, estas nur alligiteco, nur kutimo. Se sur via loko estus alia homo, via: uh ... Floro, se mi ne eraras, kondukis same kun li aŭ ŝi. Ĝi same kurus al la pordo, kiu ajn malfermus ĝin, ĉar ĝi scius, ke ĝia mastrino nun donos al ĝi manĝaĵon. Ĝi same frotiĝus kontraŭ kruro de tiu alia, ĉar ĝi alkutimiĝis, ke post tio ĝi estas karesata. Tio estas ĉio. Ne serĉu romantikon tie, kie ĝi ne povas esti.

La viro denove ekokupis sin pri la liniilo. Li frapetis per ĝi la tablon, kaj lia tuta aspekto, lia apenaŭ videbla rideto parolis pri tio, ke li estis evidente kontenta pri siaj vortoj. Nina havis neniun ŝancon en tiu lukto. Li havis malantaŭ si sciencon, ŝi havis nur siajn proprajn konvinkojn, kaj eĉ tiuj evidentiĝis ja ne tiel firmaj, se nun la virino silentis, simple pririgardis siajn manojn. Nina ne ofendiĝis, nur sentis sin sufiĉe deprimita por arogi al si ne respondi liajn lastajn vortojn. La viro rimarkis ŝanĝojn sur ŝia vizaĝo, kaj ankaŭ li rimarkis tian klaran profilon de ŝi, tian helan, preskaŭ travideblan kaj ankoraŭ junan haŭton kovritan per efelidoj. Ŝi sidis ĉe la fenestro, tute kadrita de lumo kaj en iu momento ŝajnis al li, ne, ne bela - sankta, pura kaj senpeka. Li tiel volis tuŝi ŝian manon! Kaj ĉar li neniam rifuzis al si la plezuron de amoraĵo aventuroj, do li, sen pensi longe, ĵetis sin al ŝiaj piedoj.

- Ho mia karulino, ĉu mi povas nomi vin simple Nina? - kaj ne atendente ĝis la respondo, li daŭrigis: - Ne malĝoju tiel, amo ekzistas, kaj iufoje evidentiĝas, ke ĝi estas tute proksime, tute apude, oni nur bezonas scii, kien rigardi.

Li diris ĉion ĉi, kaŭriĝinte apud la genuoj de Nina kaj kunpremante firme ŝian tremantan manon. Nina tiom ektimis tiun subitan atakon, ke ŝi ne tuj komprenis, kio okazas, kaj kiam ŝi komencis elŝiri la manon, evidentiĝis, ke estis tro malfrue. Li tenis ĝin per siaj varmegaj polmoj kaj plurfoje tuŝis ĝin per siaj lipoj. Nur antaŭ nelonge Nina estis tiel malĝojigita. Ŝin maltrankviligis la vortoj dicitaj de la sinjoro. Ie en sia animo ŝi eĉ komencis koleri pri li, ĉar li kuraĝis atenci la plej karan - Floron, ŝian teneran, amantan katinjon. Ankoraŭ antaŭ kelkaj minutoj ŝi kapablis eĉ respondi akre al li por silentigi lin, sed nun ... nun Nina ne povis eĉ analizi siajn pensojn, la ĉambro turniĝis kaj se la virino nun starus, ŝi simple ne tenus sin sur la piedoj. Nun ŝi eksentis lian manon ankaŭ sur sia genuo.

Al ŝi ŝajnis, ke ŝi deziras, ke li ĉesu, sed kial do ŝi ankoraŭ diris al li nenion, ne ĉesigis la tuton? Nina

sidis sur sia seĝo ĉe la kudromaŝino kaj eĉ timis movi sin, timis enspiri kaj elspiri, timis rigardi lin. La sinjoro diris al ŝi, kiel bela ŝi estas kaj kiel delikata estas ŝia haŭto. Sed Nina, kiu preskaŭ ne aŭdis, ne povis kredi, ke ĉio ĉi okazas al ŝi. La sinjoro evidente ŝatis tiun ludon, li murmuris ion, rigardis Nina-n la tutan tempon de sub siaj okulvitretoj, sentis, ke lia emeritaĝa karno estas tiel juna kiel lia animo kaj estis feliĉa. Nina tuta tremis, eble unuafoje dum tiom multaj jaroj ŝi sentis sin virino kaj ankaŭ estis feliĉa. Sed tiu eksplodo de emocioj, eksplodo de ambaŭ iliaj tiel malsamaj feliĉoj daŭris tute ne longe. En la koridoro aŭdiĝis paŝoj kaj poste ankaŭ voĉoj, kaj ili alproksimiĝis. Ili ambaŭ komprenis, kio okazis.

Nina etendiĝis en sia seĝo kaj moviĝis ankoraŭ pli proksimen al la tablo, penante egaligi sian spiradon, kaj la viro surpiediĝis, laŭte ekĝeminte - ŝajne lia dorso ekdoloris - kaj jam apud ŝia orelo anhelante flustris ion. Nina povis kompreni nur kelkajn lastajn vortojn: morgaŭ je la dudeka ĉe la monumento de Mickiewicz, sed tio sufiĉis al ŝi por kompreni, pri kio temas.

Ekde la reveno de la laborantinoj al la kudrejo Nina ne kuraĝis almenaŭ ankoraŭfoje rigardi lin. Ŝi aŭdis

nur mallongan "dankon" kaj frapon de la pordo, kiu fermiĝis post li. Nur tiam Nina apogis sin al la dorso de sia seĝo kaj tro longe rigardadis la fenestron. La virinoj eĉ interŝanĝis la rigardojn, montrante unu al la alia la rigidiĝintan figuron de Nina, kies stato de revemeco estis eksterordinare malofta, kaj sensone ekhihiis. Sed Nina plue rigardadis pasantojn, malnovajn grizajn domojn kaj pensis, ke tiu strato estas vere tre bona kaj verŝajne vere pratempa.

El malnova pola domo, de kiu simple blovis vento humida kaj malvarma, la sinjoro aperis sur la superplena, inundita per agrablaj printempaj radioj strato, deskuis sian ankaŭ sen tio perfektan kostumon kaj kun miro komencis rememori ĉion, kio ĵus okazis al li. Liaj manoj poiome ĉesis tremi kaj la antaŭnelonge ardiĝinta vizaĝo estis revenanta al sia normala stato. Kio ĝi estis? Kaj kial ĝuste tiu virino? Nun la sinjoro neniel povis rememori, kio ĝuste tiel logis lin en ŝia aspekto. Li rerigardis la grizan konstruaĵon malantaŭ sia dorso kaj skuinte la kapon rapidis al la kunveno, pri kiu li ial tute forgesis kaj al kiu li jam sufiĉe malfruiĝis.

(daŭrigota)

## Ĉu Esperanto havas kulturon? Jes kaj ne!

-- el Liberafolio

**L**aŭ iuj kritikantoj de Esperanto, ekzemple reprezentantoj de la Eŭropa Komisiono, la lingvo ne taŭgas por seriozaj celoj ĉar mankas al ĝi kulturaj referencoj. Malmultaj esperantistoj dubas pri la ekzisto de esperanta kulturo, sed kia estas la ligo inter lingvo kaj kulturo? Por eviti konfuzon, nepras fari klaran distingon inter lingvo kaj ĝia parolkomunumo, opinias Detlev Blanke. "La problemo, estas, kiom da kulturelementoj ĝenerale estas ligitaj al Esperanto kaj kiom da ili estas ligitaj nur al ĝi. Ofte la diskutoj pri la temo estas ĵonglado inter rigora kaj metafora sencoj de tiu konstato", li skribas.

**Antaŭrimarkoj:** Ĉiam denove oni trovas la aserton de neinformitoj, ke Esperanto ne havas kulturon. Ni scias pri la senbazeco de la asertoj kaj eble ne plu tre miras. Tamen, se foje ankaŭ informitoj asertas same, tiam la miro povas esti granda. En la germanlingva artikolo *Der Jargon des Esperanto-Weltbundes* (= "La ĵargono de UEA"), troviĝanta en antologio direktita al universitataj instruistoj de la germana lingvo, d-rino Alicja Sakaguchi (profesorino en la Universitato Adam Mickiewicz Poznano/Pollando) asertas, ke Esperanto ne estas "portanto de iu kulturo".

Alicja Sakaguchi ne estas iu ajn. Ŝi flue parolas

*Esperanton, edukis siajn du filojn en Esperanto (kun japana edzo, la familia lingvo estis/estas[ankoraŭ?]) Esperanto, habilitiĝis (post vanaj klopodoj en Germanio) pri interlingvistiko en Poznano, multe verkis, ofte tute bone pri Esperanto. Tamen konscie ŝi tenas distancon al la lingvo-komunumo, apenaŭ partoprenas en ties aktivecoj, ofte malŝate komentas la agadon de "amatoroj" ktp. Mi longe observis tiun evolun. Sed finfine mi sentis min devigita reagi. En "Informilo por Interlingvistoj" (nro 54 [3/05]) mi analizis la konfuzan artikolon kaj donis germanajn citaĵojn kun tradukoj. La redaktoro de Libera Folio, Kalle Kniivilä lerte redaktis la esencon de mia analizo, kiu aperos sube. La citaĵoj estas el la originala artikolo. Interesitoj povas ĝin peti de mi (dblanke.gil@snafu.de).*

**Detlev Blanke**

Lige al la demando, ĉu Esperanto "havas" kulturon, ŝajne ekzistas baza miskompreno. Ĉu la germana lingvo "havas kulturon", same la pola, angla, hungara ktp.? Rigorasence la respondo estas, ke lingvoj en si mem ne "havas" kulturon. Do sekve ankaŭ Esperanto ne "havas" kulturon. Metafore oni tamen ofte diras, ke tiu aŭ jena lingvo havas kulturon. Tiam Esperanto ja "havas" kulturon. Tamen la problemo, estas, kiom da kulturelementoj ĝenerale estas ligitaj al Esperanto kaj kiom da ili estas ligitaj nur al ĝi. Ofte la diskutoj pri la





Specimenoj de esperanta kulturo.

temo estas ĵonglado inter rigora kaj metafora sencoj de tiu konstato.

Ĝenerale estas akceptat

e, ke lingvo en si mem estas kulturaĵo. Do, Esperanto estas kulturaĵo. Kvankam neniu lingvo en si mem havas kulturon, tamen kulturon ja sendube havas la lingvo-komunumo, la parolantaro de lingvo. Ĝi havas/ portas, konservas, pludonas sian kulturon aŭ foje eĉ detruas elementojn de ĝi (ekz. la nazioj en Germanio). Tiu kulturo reflektiĝas kaj konserviĝas en la difinita lingvo de diversaj grupigoj kaj estas eksciebla pere de ĝi. Tio ekz. povas koncerni jenajn lingve distingeblajn parolantarojn:

- \* regionlingva (dialekta) parolantaro kun sia kulturo (ekz. la bavara en suda Germanio)
- \* nacilingva parolantaro kun sia kulturo (ekz. la superregiona germana)
- \* minoritatlingva parolantaro kun sia kulturo (ekz. la regione limigita soraba en Germanio)
- \* enmigrintoj (ekz. turkoj en Germanio, ĉinoj kaj aliaj etnoj en Usono ktp.), kiuj ofte loĝas en certaj gettoj aŭ specifaj kvartaloj (diversgrade) kunportas kaj flegas siajn lingvojn kaj kulturojn ktp.

Laŭ tio videblas, ke difinitaj homoj samtempe povas havi diversajn identecojn kun diversaj kulturspecifaĵoj. Persono x etne povas esti germano, regione kaj dialekte bavaro, politike verdulo, religie katoliko, ktp. Li/ŝi ankaŭ povas havi la identecon de esperantisto, senti sin eŭropano kaj tiel plu. Elementoj de tiuj diversaj kulturmedioj estas aktualigeblaj depende de diversaj kuntekstoj kaj kondiĉoj: socia, psika, situacia, hommedia kaj aliaj.

**Diverslingvaj, diversdevenaj, diverskleraj** homoj, kiuj uzas Esperanton kaj vivas en ĝia lingvo-komunumo, spertas vole nevole la diversoriginan kulturon de tiu lingvo-komunumo, eble eĉ kontribuas al ties riĉigo (ekz. per tradukoj), kvankam tre malsame laŭ maniero, kvalito kaj intenseco.

Depende de la kultura nivelo, kiun havas la unuopaj parolantoj, tiu kulturo kun siaj elementoj

povas esti konata, konscie flegata, pludonata al la infanoj, disvastigata ktp. Tio okazas pli-malpli konscie profunde kaj intensive aŭ apenaŭ rimarkeble. Ekzemple intelektulo, kiu interesiĝas pri la partoj de la tradicia kulturo (literaturo, muziko, arto, teatro ktp.), evidente aktualigas pli da kulturaj tavoloj kaj elementoj ol homo, kiu ne interesiĝas pri ĉio ĉi. Tio kompreneble reflektiĝas en la uzata lingvaĵo de la difinitaj homoj kaj homgrupoj.

Se iuj germanoj ne interesiĝas pri diversaj fakoj, medioj de kulturo, ekz. nek konas Faŭston nek modernan literaturon ktp., ili ne komprenos la specifan leksikon, la aludojn ligitajn al tiuj kulturaĵoj, la kunsencaĵojn (konotaciojn). Ĉu tio signifas, ke la germana lingvo-parolantaro ne konservas, reflektas tiajn kulturaĵojn, ne "havas" kulturon?

Parolante pri tio, ke lingvo (resp. ties komunumo) havas/ne havas kulturon, oni nenion diras pri la kvanto kaj kvalito de tiu kulturo, nek pri la grado de la originaleco. Se difinitaj parolantoj de Esperanto ne interesiĝas pri kulturaĵoj konservitaj en Esperanto (ekz. originala literaturo), nek pri la lingvo-komunumo kun siaj tradicioj, sia strukturo en pasinteco kaj nunto, ne sekvas la dinamikon de la lingvo-komunumo, la procezojn, konfliktojn, do la historion kaj simile, ne partoprenas la aktualan internacian vivon de la komunumo parole kaj skribe, do sekve ne uzas la leksikon ligitan al tiuj fenomenoj, ĉu tio signifas, ke la Esperanta lingvo-komunumo ne disponas pri tiuj fenomenoj?

Facile proveblas, ke tiuj fenomenoj objektive estas konservataj (priskribataj) en la lingvo, ke iliaj specifaĵoj reflektiĝas en ĝi, eĉ se subjektive oni ne interesiĝas pri ili. Ŝajne Eugen Wuester estis la unua, kiu abunde reflektis pri la lingvo-komunumo en sia Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana, Leipzig, 1923-1929; (mi aliloke abundete verkis pri la vortaro en Esperanto kaj la germana).

**Ĉiu lingvo estas parto** de la homa kulturo. Sekve ankaŭ Esperanto. La homa kulturilata agado reflektiĝas en la lingvo vertikale (agadspecoj) kaj horizontale (regionoj), do ene de difinita medio, en iu fako, organizaĵo ktp. sed ankaŭ en dialekta regiono, nacio (ŝtato), kontinento aŭ internaciskale. Sekve ankaŭ la kulturilata agado de esperanto-parolantoj, resp. la rezultoj de tiu agado, reflektiĝas en la lingvo.

La difinita(j) lingvo(j) por la homo havas diversajn funkciojn: Per lingvo li/ŝi pensas, komunikas, emocias; akiras, konservas kaj pludonas sciojn, ekkonojn, spertojn ktp. En la plej multaj kazoj por la individuo la lingvo estas grava identigilo. Tio aparte validas rilate al kulturtemoj, sendepende de tio, kiom

larĝa aŭ mallarĝa estas nia difino pri kulturo. Tiun funkcion evidente ankaŭ havas Esperanto.

En la supre menciita artikolo d-rino Alicja Sakaguchi (AS) klopodas argumenti, ke ne ekzistas aparta kulturo de Esperanto kaj ke la lingvaj ekzemploj, ofte menciitaj kiel esperantismoj, nur uzatas de oficistoj de la Centra Oficejo de UEA, resp. de UEA-aktivuloj. Tiuj esperantismoj laŭ ŝi formas specifan "ĵargonon de UEA" La "ĵergono" de UEA laŭ AS estas uzata en la Centra Oficejo de UEA kaj de la Komitato de UEA - de proksimume 80 personoj. Ege miriga aserto.

Estas konate, ke en ĉiuj ago-medioj uzatas specifaj stiloj (funkciaj stiloj), do ankaŭ en oficejoj de organizaĵoj, en redakcioj, gvidinstancoj ktp. aŭ en familioj. Tio ankaŭ koncernas Esperanton. Tamen tiuj stiloj neniam kovras la kompletan uzatan lingvaĵon. Pri la elekto de la stilelementoj decidas la situacio kaj la komunika celo.

Multaj el la menciitaj leksikaj ekzemploj por informitaj esperantistoj pruvas la malon de tio, kion la artikolo volas kredigi. Ili ligiĝas al la historio, strukturo, konceptoj, debatoj ktp. en la komunumo, ne nur en la Centra Oficejo. Tiun lingvaĵon uzas multaj esperantistoj, kiuj estas ligitaj al la lingvo-komunumo kun siaj specifaj, kompreneble ne nur en CO, ne nur en la Komitato de UEA, sed ankaŭ ekster tiuj strukturoj. Ofte temas pri vortludoj, frazeologiaĵoj ktp. (pri tio valoras legi la libron de Sabine Fiedler Esperanta Frazeologio, eldonita de UEA en 2002 aŭ diversajn studojn de Aleksandro Melnikov, kiu antaŭ nelonge habilitiĝis pri la temo).

AS skribas, ke "...Esperanto estas transetna, transnacia lingvo sen tradicioj, folkloro, vivostiloj kaj kondukmanieroj, kiuj karakterizas difinitajn popolojn. Ĉiu uzanto de Esperanto jam apartenas al difinita popolgrupo kaj povas identiĝi kun difinita etna kulturo kaj religio".

**Kiel dirite, Esperanto en si mem** ne "havas" tion kaj jenon, nek tradiciojn, vivstilon, kondukmanieron ktp. Sed la lingvo-komunumo ja havas, kvankam ne homogene, ne unuece. Ke Esperanto-uzanto apartenas al diversaj grupigoj kaj identiĝas kun ties diversaj kulturoj (religioj ktp.), neniel pruvas, ke ne ekzistas esperantista identeco kun siaj specifaj. Ĉiu homo povas aparteni al diversaj kulturoj samtempe, kiel mi jam montris.

AS asertas ke "[...]oni ĝenerale supozas, ke ĉiu homa lingvo reflektas difinitan kulturon". Kiu estas "oni" ? Kiu ĝenerale supozas tion? Kiun "difintan" kulturon reflektas la germana, la angla, la franca ktp.? La lingvoj ĉiam reflektas grandegajn partojn de aliaj

kulturoj, de la monda kulturo. Kiun "difinitan kulturon" reflektas la franca lingvo de francparolanto el Malio, iun etnan lingvon aŭ la francan?

La germana kapablas reflekti diversajn kulturojn, se ili estas bone esprimitaj tradukitaj/ priskribitaj en la germana. Bone germane parolanta turko ja povas reflekti en la germana pri turkaj tradicioj. Kompreneble necesas klarigi nekonatajn nociojn, enkonduki novajn esprimojn aŭ transpreni ilin rekte el la fonto-lingvo (t.n. realaĵoj, pri japanaj realaĵoj en Esperanto kp. ekz. "Japana Enciklopedieto"). Kvankam la lingvo-kategorioj de la difinita lingvo ja influas la pensadon, tamen ili ne strikte kaj sklave determinas ĝin.

**Laŭ mi la profunda eraro** en tiu pensmaniero estas, ke ĝi ligas la kulturon al la lingvo kaj ne al la lingvo-komunumo. Tio montriĝas en jena demando de AS: "[...]Ĉu entute neŭtrala dua lingvo, kiu supertavoligas plurajn naciajn lingvojn kaj kulturojn, povas evoluigi propran kulturon?" Kompreneble la lingvo mem ne povas evoluigi tian kulturon, sed ja la lingvo-komunumo kapablas fari tion.

En ĉiu lingvo oni fariĝas informito, se oni legas pri aŭ partoprenas/is la eventojn. Kompreneble, la diversaj idealoj, la klopodoj de la movado (espero pri certagrada oficiala akceptiĝo de Esperanto, almenaŭ disvastigo k.s.), simboloj, sintenoj ktp., kiel substrekas AS "[...] ne povas esti rigardataj komunaĵo de ĉiuj esperantistoj)". Kompreneble ne. "La" movado ne ekzistas kiel klare konceptebla fenomeno. En la movado ekzistas tre diversaj grupigoj, tendencoj kun diversaj ideoj, idealoj, celoj, agoj ktp. Tial estus pli bone paroli pri lingvo-komunumo. Mi povus citi multajn sintenojn, ideojn, idealojn, sciojn, celojn ktp., kiuj ne estas komunaĵo de ĉiuj germanoj, eĉ ne tiuj de mia najbaro kaj mi.

Male al AS, laŭ mi en Esperanto (=la komunumo) troviĝas certaj kutimoj, antaŭjuĝoj, stereotipoj, sociaj reguloj, tradicioj, sintenoj (ekz. pri senperfortaj internaciaj rilatoj, lingva samrajteco).

Parolante pri tio, ĉu Esperanto havas/ne havas kulturon, oni klare distingu inter lingvo kaj la parolkomunumo. Tio helpas eviti konfuzojn.

verkis: **Detlev Blanke** \*

Fonto: <http://www.liberafolio.org/arkivo/>  
[www.liberafolio.org/2005/Komentario/chukulturo/](http://www.liberafolio.org/2005/Komentario/chukulturo/)

\* D-ro Detlev Blanke, unu el la plej renomaj nuntempaj interlingvistoj, kaj multjara kunlaboranto de ESF, forpasis la 20-an de aŭgusto 2016 en Berlino.


**H**emiaj raketoj estas fortaj kaj la bazo de ĉio, kion homaro ĝis nun atingis en la kosmo. Tio ne signifas tamen, ke ili estas perfektaj. Ĥemiaj raketoj estas danĝeraj, kreas multe da spacrubaĵoj kaj estas tre malefikaj. Esence ĥemiaj raketoj funkcias per eksplodigi brulaĵojn, por ke la ĥemia energio en la brulaĵoj iĝu energio de moviĝo: kinetika energio. Ju pli granda la maso de la raketo estas, des pli da energio oni bezonas por movi ĝin, do des pli da brulaĵoj oni bezonas. Tio kompreneble ne nur aplikeblas al la maso, kiun oni volas transporti. La brulaĵoj, kiujn oni devas kunporti ankaŭ havas mason kaj devas esti movataj, por kio oni bezonas eĉ pli da energio. Tiu energio venas de pli da brulaĵoj, kiuj mem denove havas mason. Tio signifas ke la kvanto de brulaĵoj bezonata por rapidigi iomete pli pezan raketon kreskas freneze rapide kaj oni devas konstrui raketon, kiu povas sekure transporti tiom multe da brulaĵoj sen eksplodi. Tio kreas aron da defioj. Novaj teĥnologioj kiel reuzeblaj raketoj aŭ spacaviadiloj estas proponataj de komercaj entreprenoj kiel la solvoj de la estonteco, sed biletoj por komerca flugo ĉirkaŭ la Luno estas ankoraŭ nur imageblaj al la plej riĉaj. La Atlas V kapablas porti masojn kontraŭ ĉirkaŭ €20 000/kg al malalta orbito, la Delta IV kontraŭ ĉirkaŭ €17 000/kg kaj laŭ SpaceX, la teoriaj kostoj por la Falcon Heavy raketo estus ĉirkaŭ €2 200/kg, se ili sukcesas lanĉi sufiĉe multe da raketoj. Tiuj kostoj rilatas al la maso de tio, kion oni transportas kaj enkalkulas la kostojn por la raketo kaj brulaĵoj, sed homoj ne estas normala maso. Kiam oni transportas homojn, oni ankaŭ enkalkulu la fakton ke ili bezonas spacon por moviĝi kaj multe da aldona maso en la formo de akvo kaj manĝaĵoj kaj la aparatoj, kiuj igas la medion en la raketo travivebla. Bedaŭrinde, tio igas la utopian bildon de ferioj al Marso por la tuta familio ŝajni eĉ pli for, sed eble ekzistas solvo.



< La giganta Falcon Heavy povus esti nekredeble efika.

En 2012, la Japana entrepreno Obayashi anoncis siajn planojn por konstrui kosmolifton en 2050. Tiu plano sonas freneza, sed ili ne estas la sola. Ankaŭ la Ĉina kaj Usona

Spacagentejoj esprimis intereson pri la ideo. Kompreneble la konstruado de lifto al la kosmo estus la plej granda konstrua projekto iam ajn kaj kostus miliardojn, sed laŭ la kalkuloj, lifto igus spacesploradon tiom malmultekosta ke oni rapide regajnus la monon. Laŭ la estimoj, oni povus transporti masojn kontraŭ nur €200/kg kaj oni povus vojaĝi multe pli frekvente ol per tradiciaj raketoj. Kompare al la raketoj de nun, liftoj estus eĉ tiom kostefikaj ke la unua lando, kiu sukcesas konstrui ilin, esence povas regi spacesploradon. Aldone, krei la unuan lifton igas krei la sekvan multe pli facila kaj malmultekosta. Ekonomie la decido de konstrui kosmolifton do ŝajnas evidenta, sed ĝis nun ankoraŭ neniu entrepreno aŭ registraro komencis la konstruadon de tia projekto. La ĉefa kialo por tio estas ke oni ankoraŭ ne kreis materialojn, kiuj povas elteni la fortojn, kontraŭ kiuj la lifto devus fronti. Por kompreni tiujn fortojn tamen, oni komprenu la dezajnon.




<La dezajno konsistas el longa ŝnuro kun granda maso je la fino.

Laŭ Guinness World Records, la plej alta konstruaĵo, kiun oni ĝis nun konstruis estas la Burĝ Ĥalifa en Dubajo. Ĝi estas 828 metrojn alta. Kompare al la grandeco, kiun oni bezonas por kosmolifto, tio estas tute nenio. Por praktike funkcii, la

lifto devus esti minimume pli alta ol 36 000km, ĉar je tiu alteco, objektoj en orbito rondiras same rapide kiel la Tero mem. Praktike, la lifto devas esti pli longa tamen kaj la propono de la entrepreno Obayashi temas pri lifto de 96 000km! Malgraŭ tio ke oni neniam konstruis ion, kio eĉ similas al ĉi tiuj grandecoj, nova efiko ekfunkcias je tiuj altecoj, kiu ne uzeblas je la surfaco. La lifto konsistus el longa ŝnuro kun granda maso je la fino, kiu streĉus la ŝnuron pro la centripeta forto. Tio signifas ke la lifto ne riskas kolapson, sed ĝi ja devas elteni gigantajn streĉfortojn. Laŭ la propono de Obayashi, oni bezonas materialon por tio, kiu eltenas streĉojn de 150GPa. Materialsociencistoj diras tamen, ke neniu konata materialo estas sufiĉe forta por esti uzata en kosmolifto. La plej promesplena elekto ĉi-momente estas karbonaj nanotuboj, sed sub tiaj fortoj, la sesangula strukturo de la molekulo povus



ŝiriĝi. Aldone, la plej longa karbona nanotubo, kiun oni kreis ĝis nun estis nur kelkajn centimetrojn, do tiom longaj tuboj estas ankoraŭ nur revoj nun. Ĝis oni kreas novajn, pli fortajn materialojn, kosmolifto surtere estas neebla kaj la materialo eĉ ne estas la sola problemo.




< Karbonaj nanotuboj estas tuboj je la molekula nivelo kaj havas tre fortan sesangulan strukturon. Ili estas inter la plej fortaj materialoj surtere.

Se oni sukcesus krei la ŝnuron, la ankron surtere kaj la maso en la kosmo, oni povas krei staciojn laŭ la lifto je malsamaj altecoj por atingi malsamajn orbitojn kaj krei ĉarojn, kiuj supreniru laŭ la ŝnuro. En perfekta mondo, tio ne estus malfacila, sed la mondo ne estas perfekta. La ŝnuro devas fronti kontraŭ la medio ĉirkaŭ si kaj kiel eble malpli ĝeni aliajn maŝinojn. En la atmosfero, tio signifas ke la lifto devas elteni venton kaj veteron kaj ke aviadiloj evitu ĝin. La plejparto de la lifto ne estas en la atmosfero, sed ankoraŭ ne estas sekura. En la kosmo, ĝi estas minacata de radiado, rokoj kaj ekzistantaj satelitoj kaj spacrubajoj. La radiado estas specife danĝera, pro tio ke oni trairu zonojn kun intensa radio, kiujn raketo tiom rapide trairas ke la astronautoj nenion rimarkas, sed ĉaro irus multe malpli rapide. La rubajoj estas specife granda risko, pro tio ke ili ofte tro etas por sekvi kaj iras tiom rapide, ke ili povus detrui la tutan lifton. Ankaŭ la ĉaroj ne estas senproblemaj. Krom se ili moviĝas tre malrapide, kio igus la vojaĝon daŭri pli ol monaton, la moviĝoj de la ĉaroj povus tremigi kaj svingi la ŝnuron. Aldone, la ĉaroj bezonas energion por moviĝi kaj doni la energion al ili ne estas tiom facila. Kelkaj ideoj por ĉi tio ekzistas, ekzemple ke oni pafas la ĉarojn per fortaj laseroj, sed neniu el la solvoj estas tute kontentiga.

Malgraŭ la severaj kondiĉoj, la koncepto de kosmolifto ne estas entute neeblaj. La Tero estas relative granda astro, sed la Luno aŭ Marso estas multe pli etaj. Ili malgrandeco kaŭzas ke la gravito sur la surfaco estas malpli granda, kio signifas ke la fortoj, kiujn la lifto devus elteni estas malpli grandaj. La surfaca gravito de Marso estas ĉirkaŭ 38% de tiu de la Tero. Aldone, la fakto ke Marso pli-malpli same rapide rotacias kiel

la Tero, sed havas malpli fortan graviton kaŭzas ke la orbito en kiu oni rondiras same rapide kiel la surfaco estas malpli alta. Tiuj faktoroj kaŭzas ke hodiaŭ konataj materialoj povus esti uzataj por krei kosmolifton sur Marso. La malavantaĝoj kompare al lifto surtere estas la distanco, kiu malfaciligas la konstruadon kaj la fakto ke unu de la lunoj de Marso, Fobo, rondiras tre malalte kaj povus multe ĝeni la lifton per sia gravito. Verŝajne la plej facila loko por krei kosmolifton estas la Luno kaj multoj subtenantoj de lifto surtere proponas la Lunon kiel unuan paŝon. La Luno moviĝas tiom malrapide, ke oni ne povas uzi la saman orbiton kiel por la Tero aŭ por Marso. Anstataŭe, oni povus fiksi la mason en L1. Tio estas la punkto kie la gravito de la Tero kaj la Luno nuligas unu la alian. Kompreneble, tio signifas ke oni nur povas konstrui lifton sur tiu flanko, kiu estas turnita al la Tero. Pro tio ke oni jam facile povas forlasi la Lunon, kosmolifto sur ĝia surfaco ne estus tiom revolucia kiel lifto surtere, sed pro tio ke ĝi verŝajne estus multe pli facile konstruebla, ĝi ankaŭ kostus malpli. Se oni do iam decidus krei kolonion sur la Luno, kosmolifto ne estus tiom stranga ideo.

Ĉi tiu mapo montras la gravitajn kampojn de la



Tero kaj la Luno. En L1, Lagrange-punkto 1, la gravitaj kampoj nuliĝas (realvive la distancoj estas multe pli grandaj).

La ideo de krei kosmolifton surtere do estas tre bona, sed tiom malfacila ke ĝi eble pli taŭgas en sciencfikciaj filmoj. Malgraŭ tio, pluraj partioj daŭre persistas kaj kreas planojn. En septembro, teamo de la Japana Shizuoka universitato lanĉis eksperimenton al la Internacia Kosmostacio, por testi la koncepton de kosmolifto je eta skalo. La eksperimento konsistas el du kubsatelitoj kun flankoj de 10cm, kiuj estas konektitaj de ŝnuro el ŝtalo de 10m. Laŭ la ŝnuro, eta ĉaro vojaĝas tien kaj reen kaj la satelitetoj povas vidi

am antaŭe, vivis paro da junaj geedziĝantoj. La juna viro estis inteligenta, sed lia edzino estis samfoje mallerta kaj stulta. Ŝi rare tuŝis ian objekton sen ĝin difekti.

Iun tagon, aĉetinte du ĵarojn el bakita tero, ŝi ilin montris al sia edzo, esperante ke tio plaĉus al li por unu fojo en ŝia vivo.

- Jen la okazo por doni al ŝi lecionon, diris al si la juna viro.

- Tio vere estos damaĝo por la novaj jaroj, se ŝi estos almenaŭ liberigita de ia abomeninda kutimo ĉion frakasi.

Kaj antaŭ sia dezino, li donis al la ĵaroj du fortajn piedbatojn, kiujn ilin displitis.

- Kion vi faris? Ĉu vi estas freneza? Ekkriis lia edzino, tute terurita.

- Mi frakosas ilin por evitigi al vi la malagrabraĵon frakasi ilin poste, respondis la edzo.

Post tiu evento, iun tagon, la juna viro sendis sian edzinon al la bazaro por aĉeti grandan fiŝon por tagmanĝo. Reveninte hejmen, ŝi montris al sia edzo la varon. Poste, ŝi kuris al lageto troviĝanta malantaŭ ilia domo kaj ĵetis en akvon la fiŝon ankoraŭ vivantan.

- Kion vi faris, malfeliĉulino? Indigne kriis la edzo.

- Estas ĝuste vi, kiu lernigis al mi tion. Mi forĵetis la fiŝon por evitigi al vi la malagrabraĵon forĵeti ĝin poste!

Kelkajn tagojn poste, ili ricevis la informon, ke iu okdekjara parenco, emerita mandareno, kiuj ili ne estis vidintaj jam de longe, baldaŭ venos vizite al ili.

- Ĉu vi scias, kiel oni devas konversacii kun grandaĝaj kaj nobeltitolitaj personoj, ventkapulino? demandis la edzo.

- Ne, instruu min, respondis la edzino.

- Antaŭ tiaj respektindaj olduloj, oni devas esti tre

ĝentila. Vi ekparolus, nur kiam ili vin demandus. Se ili demandus vin pri novaĵoj de via familio, necesus demandi ilin ankaŭ pri novaĵoj de iliaj familioj.

Unuvorte, oni devas respondi al ĝentileco per ĝentileco, kaj eĉ superproponi. Kiam li venos, mi ŝajnigos kvazaŭ mi forestus iun momenton, kaj mi lasos vin sola por interparoli kun li dum duon-horo sed atentu! Mi min kaŝos malantaŭ la kurteno kaj klinos la orelon al viaj plej bagatelaj paroloj.

Alvenis la respektinda vizitanto. Kaj jen okazis la "turniro" de ĝentileco inter li kaj la juna dommastrino.

- Mi estas feliĉa vidi vin, mia eta nepino! Kion alte vi kreskis de post tri jaroj, dum mi ne estis vin vidinta. Mi memoras, ke mi vidis vin tute malgranda, ne pli alta ol boto.

- Ankaŭ mi estas tre feliĉa vidi vin, mia granda onklo. Vi jam keskis je pluraj futoj, de post kiam mi perdis vin el la vido. Mi memoras, ke mi konis vin, tute eta bubo, kiam vi ne estis pli alta ol mia genuo.

- Kiel fartas viaj geavoj? Ili estis miaj bonaj amikoj.

- Dankon! Ili fartas tre bone. Kaj viaflanke, kiel fartas viaj prapatroj! Ili estis por mi karaj kamaradoj dum miaj infanjaroj.

Kredante, ke tiu ventkapa virineto lin mistifikas, la maljuna mandareno demandas kun kolera tono:

- Kie estas via edzo? Tuj voku lin al mi!

- Li estas tie, malantaŭ la kurteno. Li aŭskultas, ĉu mi scias konversacii kun vi, konforme al liaj rekomendoj.

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**,

eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/bona-lernantino/>

### Vortareto

- bagatelo - afero de malgranda valoro aŭ graveco.
- bazaro - loko, kovrita aŭ ne, kie estas multaj diversaj vendobudoj aŭ vendotabloj.
- boto - alta leda piedvesto, kiu atingas ĝis genuo aŭ eĉ pli alte.
- bubo - seneduka, petola knabo.
- emerito - oficisto, kiu post difinita tempo de servado, forlasas honore la oficon kaj ricevadas pension.
- damaĝo - malutili al iu, kaŭzante materian aŭ moralan perdon.
- difekti - fari ion neuzebla, ne taŭga, senvalora per fizika mistraktado.
- frakasi - perforte kaj brue disrompi, dispecigi.
- freneza - perdinta la prudenton pro mensa malsano.
- futo - mezurunuo de longo, diversvalora laŭ la landoj.
- grandaĝa - pli ol iom maljuna.

- inteligenta - facile komprenanta kaj vigle pensanta.
- ĵaro - granda terkruĉo, por teni freŝa akvon aŭ vinon, konservi oleon ktp.
- kaŝi - forigi de ies okuloj aferon aŭ estaĵon, kiun oni metis en sekretan lokon aŭ kovris per io.
- kurteno - peco da ŝtofo, pendigita por ŝirmi aŭ kaŝi ion.
- mandareno - unu el la Ĉinoj, kiuj post ekzaminiĝo apartenis al unu el la 9 klasoj de la ŝtatfunkciuloj.
- nepo - filo de filo aŭ filino, rilate al ties gepatroj.
- olda - maljuna.
- spliti - fendi (lignon kaj similaj) en maldikajn pecojn.
- sprita - posedanta spiritan viglecon, kiu ebligas rapide trovi kaj originale esprimi neatenditan rilaton inter malsamaj objektoj aŭ malsamaj vortoj.
- stulta - ne inteligenta, sensprita.
- turniro - ĉia amika konkurso pri lerteco, kiu ne donas okazon al atribuo de titolo.

## Facilaj rakontoj

### Mensoga lingvo

La lingvo estas instrumento per kiu oni false ludas sur ĉiuj kampoj de la homa vivo. Por kaŝi la krudan realon oni uzas plibeligajn vortojn, duonverojn kaj mensogojn. Ne ĉiam publiko komprenas la veran signifon de vorto aŭ frazo. Oni laŭdas informojn aŭ ĝojas pri novaĵoj kiuj, se diritaj per aliaj vortoj, estus plorigaj.

Tre misuzita estas la vorto „produkti“. Nuntempe oni produktas ĉion ajn. Ekzemple oleokompanio informas, ke ĝi en difinita periodo produktis milionojn da bareloj da nafto. Kvazaŭ la mondo pliriĉiĝus per tiu naftokvanto. La vero estas ja la malo! Esprimate per aliaj vortoj, la sama informo povus teksti jene: „El la banko de naturo, banko kies kapitalo estas limigita kaj kiu ne donas rentumon, ni forprenis milionojn da bareloj da nafto kaj tiamaniere malfaciligis la vivkondiĉojn por niaj infanoj kaj iliaj posteuloj.“

En alia speco de kruda misinformado oni uzas la vorton „senkosta“, „donaco“, „rabato“ kaj simile. Ekzemple: firmao ofertas en granda reklamkampanjo, ke ĉiu, kiu aĉetas televidaparaton, ricevas senkoste radioricevilon. La vero estas, ke la aĉetanto pagas ne nur la televidaparaton, sed ankaŭ la radioaparaton, kiun li eĉ ne deziras havi. Kaj krome la aĉetanto kontribuas al la pago de la reklamkostoj. Tia reklamo per rabatkuponoj, ekstraj premioj kaj donacoj, kiu konstante plenigas la leterkestojn kaj turmentas la detalkomercistojn, nur kostas monon, pliriĉiĝas la reklamentreprenojn kaj ŝtelas monon de la konsumantoj. Estas ja ili, kiuj fine devas pagi ĝin. Ke la plimulto komprenas la blufon en la reklamo montras la fakto, ke en Svedio nur 3 elcentoj de l’disdonitaj rabatkuponoj estas uzitaj. Ĉiam, kiam ni legas aŭ aŭdas informojn kaj novaĵojn, ni devus kritike ekzameni la veran sencon de ilia enhavo. Precipe, se la informo venas „desupre“, aŭ „de eksperto“, ni atentnu, ĉar ili havas apartan lerton pri la maniero kiel

## sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

kaŝi la veron.

Francine



### Defrosniitaj

Butikisto en Novjorko koleris pro multaj butikaj ŝtelistoj. Ili kaŭzis al li gravajn perdojn. Li fiksitis sur la muron grandan afiŝon, kiu anoncis:

**BUTIKAJ ŜTELISTOJ ESTOS DEFROSNIITAJ !**

Post kelkaj semajnoj iu demandis al butikisto: „Kio signifas tiu defrosniita?“

Li respondis: „Mi tute ne scias, sed ekde la ekmonro de tiu afiŝo, ŝtelado el mia butikio malpliigis sesdek-procente.“

Francine

### La arto reklami

Du bakistoj havis butikojn en unu strato. Unu metis grandan afiŝon sur sian fenestron: ni vendas la plej bonan panon en la mondo.

Rivalo momente koleris, poste metis sur sian fenestron afiŝon malpli grandan, malpli laŭtkoloran: ni vendas la plej bonan panon en ĉi tiu strato.

Francine

### Blanka aŭ rozkolora

Usonano volis vendi salmokaron en skatoloj, sed temis pri specio de salmo, kies karno estas blanka. Homoj, kiuj atendis, ke salmokarno estu rozkolora, ne volis aĉeti. Ĉu kolorigi la karnon? Ĉu presigi sur la etiketon sciencan klarigon? Ĉu bankroti?

La komersicto presigis sur etiketojn:

*"Aŭtentika blanka salmokarno.*

*Ni garantias, ke ĝi ne ruĝiĝos en la skatolo."*

Ĉiuj miloj da skatoloj oni disvendiĝis.

Francine

**30 >** kiom ĝi progresas per kameraoj. La teamo estas pozitiva pri la estonteco. Oni neniam scias kiam oni malkovros la sekvan miraklan materialon kaj kiam oni trovis ĝin, oni bezonos la datumojn. Neniu povas antaŭvidi la estontecon tamen, do por scii ĉu kosmoliftoj vere

iĝos realeco, oni nur povas atendi.

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2018/11/07/kosmoliftoj-cu-sciencfikcio/>

## Solvo de la krucvortenigmo

|   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| O | N | O | R | O | K |   | O | N | I | D | O |
| N | O | K | E | Ĉ |   | O | R | O | T | O | D |
| I | N | E | P |   | O | M | I | R | P |   | V |
| T | T | T |   | O | R | E | P | O |   | V | T |
| O | E |   | I | F | I | O | S |   | O | N | O |
| K |   | V | A | T | R | E | P |   | V | A | R |
| I | G | I | B | U | D |   | S | I | D | R | O |
| N | O | M | E | S |   | N | O | T | E | I | Ĉ |

